der esperantist

Mitteilungsblatt der Esperantofreunde im Kulturbund der DDR

9. Jahrgang Nr. 57/58 Januar—Mai 1973 60 Pf

Proletoj de ĉiuj landoj, unuiĝu!

La Manifesto de la Komunista Partio (1848-1973)

Ĝi sendube estas la unua plej kompleta prognozo pri la socia evoluo de homaro. Ellaborita de Marx kaj Engels en la komisio de la dua kongreso de la Ligo de Komunistoj (1847) ĝi estas la unua programa dokumento de la marksismo, kies unua eldono aperis 1848 en London kaj hodiaŭ estas tradukita en la plej multajn lingvojn de la mondo, inkluzive Esperanto. Ĝi estas la „naskiĝa dokumento de la scienca socialismo". „Tiu malgranda libreto", skribis Lenin, „valoras tutajn libregojn: ĝia spirito vivigas kaj movigas ĝis hodiaŭ la tutan organizitan kaj batalantan proletaron de la civilizita mondo". La manifesto armis la mondan proletaron per la revolucia teorio de la scienca socialismo, malkovris la leĝojn de la socia evoluo kaj ebligis al la laborista klaso ekkoni sian propran rolon kiel pereigonto de la kapitalismo, kreonto de la komunisma socio. Marx kaj Engels ekkonis, ke la klasbatalo estas la movoforto de la evoluo en antagonisma socio. Ili pruvis, ke tiu klasbatalo kondukos neeviteble al sentronigo de la burĝaro kaj al la diktaturo de la proletaro, kiu siavice nur enkondukas la evoluon de la senklasa komunisma socio. Ke la prognozo, starigita de Marx kaj Engels por la homa socio, estas ĝusta, ĉiutage denove sin pruviĝanta, tion konstatos tiu, kiu iom komprenis la pasinton kaj atente sekvas la nuntempon.



Impresoj de la VIII-a Kongreso de Kulturligo de Germana Demokratia Respubliko

de Rudi Graetz

La „Kulturligo de Germana Demokratia Respubliko“ estas kulturpolitika organizaĵo de GDR. Kontraŭfaŝismaj intelektuloj fondis ĝin 1945 kiel „Kulturligo por la Demokratia Renovigo de Germanio“. Iniciatinto kaj unua prezidanto estis Johannes R. Becher. Konsento flanke de la soveta komandanto de Berlin por la fondo jam estis donita je la 25a de junio 1945. Do nur sep semajnojn post la fino de la terura dua mondmilito, kaŭzita de faŝisma Germanio. Nomŝanĝo al „Germana Kulturligo“ okazis 1958.

La plej supera organo de la Kulturligo estas la ligo-kongreso. La VIII-a Ligo-kongreso okazis en la tempo de la 26a ĝis la 28a de oktobro 1972 en Berlin. La delegitoj kaj gastoj el ĉiuj grupoj kaj organizoj de Kulturligo de GDR kunvenis por bilanci la laboron faritan dum la pasintaj kvar jaroj kaj por skizi la vojon irendan. Krom raportoj, referaĵoj, diskutoj, akcepto de rezolucioj ktpl. tie kompreneble ankaŭ okazis la novelektoj de prezidanto, prezidantaro, de preziduma konsilantaro kaj de la centra revizia komisiono kaj krome nomŝanĝo al „Kulturligo de Germana Demokratia Respubliko“.

Ĉar ankaŭ mi apartenis al la 400 elektitaj delegitoj, mi povis partopreni tiun ĉi gravan kongreson, same kiel du pluaj esperantistoj de GDR. Krome el niaj vicoj ankoraŭ partoprenis tri gastdelegitoj. Ankaŭ al la novelektita preziduma konsilantaro apartenas tri esperantistoj.

Ne nur la festa halo, sed ankaŭ la prezidumo de la VIII-a Ligokongreso estis impona. Al ĝi apartenis altaj gvidantoj ministroj, prezidantoj kaj aliaj gravaj funkciuloj. Al la gastoj apartenis kompreneble ankaŭ la prezidantoj de ĉiuj partioj, kiuj ekzistas en GDR. La tuta atmosfero de la kongreso estis plaĉa kaj hejmeca.

La prezidanto de Kulturligo, profesoro d-ro Max Burghardt raportis. *menciinte ankaŭ la laboron de la esperanto-laborgrupoj.* Okazis viglaj

---

El la enkonduko de la „Komunista manifesto“:

Fantomo ĉirkaŭvagas en Eŭropo — la fantomo de l'komunismo. Ĉiuj potencoj de malnova Eŭropo kuniĝis por sankta pelĉaso kontraŭ tiu fantomo, la papo kaj la caro, Metternich kaj Guizot, francaj radikaluloj kaj germanaj policistoj.

Kie estas la opozicia partio, kiu de siaj regantaj kontraŭuloj ne estus prikriita kiel komunista, kie la opozicia partio, kiu al la pli progresaj opoziciuloj same kiel al siaj reakciaj kontraŭuloj ne estus reĵetinta la brulsignantan rproĉon de l'komunismo?

Duoblo sekvas el tiu ĉi fakto.

La komunismo estas jam de ĉiuj Eŭropaj potencoj agnoskata kiel potenco. Estas urĝa tempo, ke la komunistoj siajn opiniojn, siajn celojn, siajn tendencojn antaŭ la tuta mondo malkaŝe prezentu kaj al la fabelo pri la fantomo de l'komunismo kontraŭmetu manifeston de la partio mem.

Por tiu celo komunistoj de plej diversaj nacioj kunvenis en Londono kaj verkis la sekvantan manifeston, kiu en angla, franca, germana, itala, flandra kaj dana lingvoj estas publikigita.

diskutoj en la plenkunsido, same en la ses kongresaj laborgrupoj. Bonajn eblecojn por elmontri pli detale niajn ideojn kaj opinion, ni esperantistoj havis en *laborgrupo kvar*, kiu pritaksis la taskojn de la kulturligo per la kunlaboro de la juna generacio en la intelekta-kultura vivo kaj en la *laborgrupo ses*, kiu diskutis pri la kunrespondeco de la kulturligo por varia kultura agado de la laboruloj. Krome ni povis doni *kvinpaĝan skriban diskutkontribuon* al la prezidantaro de la plenkunsido por la kongresraporto.

Jam antaŭ la kongreso, ĉiu delegito ricevis bonege presitan raporton kun ilustrita suplemento, enhavanta multajn fotojn. En tiu ĉi raporto troviĝas multaj diversaj alineoj, kiuj sufiĉe amplekse raportas *pri la agado de la esperantistoj* de GDR dum la lastaj jaroj. En la suplemento estas menciitaj *titoloj kaj eldonkvanto de la broŝuroj kaj gazetoj*, kiujn ni ĝis nun eldonis, kiel ekzemple „Germana Demokratia Respubliko — bildoj kaj faktoj“ 20 000, GDR-„Paco“ ĉiujare 7000 ekzempleroj ktpl.

Sur paĝo 30 de la suplemento estas videbla belega foto de *silka flago* kun esperanto-teksto, *kiun donacis al ni niaj vjetnamaj amikoj*. Apud la foto vi povas legi germanlingvan tekston: *„La esperantistoj de GDR faris la solidarecon kun la vjetnama popolo sian propran koraferon. Centra Laborrondo Eperanto en Kulturligo de GDR 1971 ricevis kiel dankon kaj signon de solidareco de Vjetnama Esperanto Asocio por la defendo de la Paco (DRV) ruĝan broditan flagon kun la surskribo „Al Centra Laborrondo Esperanto de GDR Vivu la vjetnama-germana amikeco! Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio 1971“.*

Ankaŭ en la *statistikaj desegnoj* de la suplemento la agado de la esperantistoj trovis sian vere decan, neignoreblan lokon.

Tiu ĉi presita raporto, pli ol centpaĝa inkluzive suplemento, laŭ mia opinio montras veran aprobon de nia ĝisnuna laboro. Ĝi estu instigo por ni, ankoraŭ pli bone utiligi ĉiujn eblecojn por plua plibonigo de nia laboro kaj per ĝi atingi pliajn valorajn rezultojn.

Sed ankaŭ en la kongresejo mem ni povis konstati rekonon de nia laboro. Inter la *ekspoziciaĵoj* troviĝis vitrinoj kun la revuoj, eldonataj de Kulturligo de GDR. Inter ili „der esperantist“ kaj „Paco“. Videblis niaj broŝuroj en esperanto. En la „Vjetnama Vitrino“ ankaŭ *du vokaloj kun bone videbla esperanto-surskribo*, produktitaj de niaj vjetnamaj amikoj el restaĵoj de faligitaj usonaj bombaviadiloj. La librostando en la kongresejo ankaŭ *vendis nian lernolibron* de Ludwig Schödl.

Ĉiu delegito kaj gasto trovis en sia *kongresaktujo* po unu ekzemplero de *„der esperantist“ n-ro 54* (preskaŭ nur germanlingve) kaj *foiran prospekton* de GDR en esperanto. La organo de Kulturligo *„Sonntag“* raportis post la kongreso pli detale pri la diskutkontribuo de *k-do Jürgen Hamann*, Leipzig en la laborgrupo ses.

La agrabla kongresatmosfero daŭris ĝis la fino. La kulturaj aranĝoj montris altan nivelon. La kongreson partoprenis delegitoj de ĉiuj 35 fakgrupoj de Kulturligo de GDR, kiel ekzemple: Scienco, kluboj de intelektuloj. Al la plej konataj fakoj apartenas: Natur- kaj patrio-amikoj (kiel la plej granda branĉo ĝi ampleksas sole 25 sekciojn, inter ili botanikuloj, flaŭruloj, numismatikuloj, historiistoj, akvarianoj, bredistoj de

orkideoj, kakto-amikoj, amfibiaj amikoj, stanfiguroj, monument-flegado, ligno-skulpistoj, folkloro-grupoj ktp.), filatelo, fotografio, arto kaj literaturo, muziko, teatro, kleriga arto, amikoj de bibliofilio kaj aliaj.

Al tiuj ĉi fakoj kompreneble ankaŭ apartenas nia internacia planlingvo Esperanto depost nun pli ol ok jaroj.

Do ni povas konkludi, ke la VIII-a Ligo-kongreso estis tre sukcesa. Ĝi donis novajn direktivojn por la estonta laboro de Kulturligo de GDR, kiu

1e estas la sola organizo, kiu unuigas multajn intelekt-kulturajn interesojn kaj servas al la kultur-krea agado de niaj civitanoj;

2e speciale faras intelektan laboron. La Kulturligo estas ejo de renkontiĝoj de sciencistoj inter si. Renkontiĝas tie natursciencistoj kaj socisciencistoj kune en kluboj kaj okazas renkontiĝoj de la intelektuloj kun la laborista klaso;

3e La VIII-a Partikonferenco de SED starigis la taskon, ke Kulturligo fariĝu kultura amasorganizaĵo de ĉiuj civitanoj.

En la kongresa rezolucio de la VIII-a Ligo-kongreso, akceptita unuanime, estas fiksitaj novaj taskoj, kiuj donas bonan bazon ankaŭ por niaj estonte ankoraŭ pli vastaj aktivecoj de nia lingva fako Esperanto. Utiligonte ĉiujn al ni donitajn eblecojn, ni povas alpaŝi al novaj sukcesoj.

Sensacio! „Nuda inter lupoj“ de Bruno Apitz en Esperanto!

Jes, vi ĝuste legis. Fine de 1973 aŭ komence 1974 aperos en GDR la unua beletra verko en la internacia lingvo. La prestiĝa eldonejo Edition — Leipzig aperigos la mondfaman romanon pri la heroa solidareco de arestitoj en la faŝisma koncentrejo Buchenwald. Verko, unika en sia speco, tradukita en pli ol 20 lingvojn, filmita kaj renkontanta la plej altan intereson internacie. Ĝin tradukis d-ro Karl Schulze, Berlin. Jen ŝanco por vi! Nepre ŝparu por aĉeti kelkajn ekzemplerojn (unu ekzemplero de la 400 paĝa romano kostos ĉirkaŭ 12 markojn) por mem posedi ĝin kaj havi taŭgajn donacojn por viaj eksterlandaj amikoj.

Artikoloj pri Esperanto

Post la granda intervjuo en „Freie Welt“ 50/72 nun ankaŭ en „Neue Berliner Illustrierte“ (NBI) 11/73 aperis artikolo pri Esperanto. NBI havas eldonkvanton kun pli ol unu miliono da legantoj, aperadas ĉiusemajne, kolore ilustrita. En la plej grava popularscienca magazino de GDR, „Urania“, 5/1973 verŝajne aperos dupaĝa artikolo de Detlev Blanke pri Esperanto. Tiu grava magazino aperadas en 120 000 ekzempleroj.

Radio „Stimme der DDR“ pri Esperanto

La menciita radiostacio dissendis en februaro kaj majo 1973 du intervjuojn pri la internacia lingvo, po 5 minutojn kun la sekretario de CLR.

Gvidprincipoj
por la laboro de la esperantistoj en Kulturligo de Germana Demokratia Respubliko

I.

La esperantistoj, organizitaj en Kulturligo de GDR, rigardas la internacian lingvon Esperanto rimedo por flego de pacaj kaj amikaj rilatoj inter la popoloj.
Kiel civitanoj de GDR ili aktive partoprenas la konstruadon de evoluinta socialisma socio en sia ŝtato. Ili vidas sian ĉeftaskon en tio, per siaj lingvoscioj konvinke prezenti al alilandaj esperantistoj la historiajn sukcesojn de la socialisma evoluo de Germana Demokratia Respubliko, parto de la socialisma ŝtata alianco.
La plua evoluigo kaj pliprofundigo de amikeco kun la esperantistoj el Soveta Unio kaj la aliaj landoj de la socialisma ŝtataro, kiel ankaŭ kun la progresivaj esperantistoj de kapitalismaj landoj apartenas al la plejgravaj celoj de l'aktivado de la laborrondoj kaj grupoj.
La esperantistoj de GDR utiligas la internacian lingvon por la ideologia batalo kontraŭ la imperiismo. Ili decide kontraŭas ĉiujn variantojn de antikomunismo, reviziismo, konverĝa teorio[1]) kaj neutralismo.
Ili aktivas por la akceptigo de la principoj de paca kunekzistado inter diverssociaj ŝtatoj, subtenas la antiimperiisman liberigan batalon kaj pledas por pli larĝa uzo de Esperanto serve al la paco kaj progreso. Ili kunlaboras kun ĉiuj progresivaj lingvo-amikoj kaj organizaĵoj, kiuj sekvas la samajn aŭ similajn celojn.
Por la esperantistoj de GDR la lernado, flegado kaj uzado de la internacia lingvo estas formo de ilia spirita-kultura aktivado, kontribuanta al la evoluo de ĉiuflanke kleriĝantaj socialismaj civitanoj.
En sia laboro la esperantistoj de GDR sin apogas je la progresivaj tradicioj de la laborista-esperanto-movado kaj utiligas tiujn kreive. Ili konscias pri tio, ke nacia lingvo estas nedisigeble ligita al la historio kaj kulturo de popolo, stampita de naciaj specialaĵoj kaj tial nek estas anstataŭebla nek forpuŝebla de Esperanto.

II.

La esperantistoj, organizitaj en Kulturligo de GDR, klopodas daŭre plialtigi la kulturpolitikan efikon de sia laboro kaj varbi novajn amikojn por sia bela agado.
La Bazaj Taskoj kaj statutoj de Kulturligo de GDR, la decidoj de ĝia Prezidia Konsilantaro kaj tiuj ĉi gvidprincipoj estas la bazo por la agado de la esperanto-laborrondoj kaj grupoj. Por realigi la menciitajn celojn ili starigas al si la sekvajn ĉeftaskojn:

1. *La esperantistoj de GDR taksas kiel antaŭkondiĉon por sukcesa agado serve al sia ŝtato la daŭran okupiĝon pri la politikaj ĉefproblemoj de la evoluo de GDR kaj eksterlande el marksisma-leninisma vidpunkto. Ili konscie kontribuas al la plialtigo de la prestiĝo de Germana Demokratia Respubliko per multflanka korespondo, per dissendo de informmaterialoj pri GDR, per kunlaboro en internaciaj organizoj kaj per sia reprezento en kongresoj kaj aliaj internaciaj aranĝoj.*
2. *La esperantistoj de GDR evoluigas multflankajn personajn kaj kolektivajn rilatojn kun esperantistoj kaj grupoj de Soveta Unio kaj de la aliaj socialismaj ŝtatoj, intime kunlaborante kun ili en politikaj,*

kulturaj kaj fakaj rilatoj, por pliprofundigi la scion pri la historio kaj nuntempo de la socialismaj popoloj.

3. *La esperantistoj de GDR estas kunbatalantoj de la Mondpaca Esperantista Movado (MEM), intime kunlaboras kun la Monapaca Konsitantaro, kaj subtenas la aktivecojn de MEM. Ili solidarigas kun ciuj popoloj luktantaj por libereco.*
4. *La esperantistoj, organizitaj en Kulturligo de GDR, kolektas kaj sistemigas dokumentojn kaj aliajn materialojn pri la laborista-esperantomovado, por daŭre konsideri en sia laboro ties progresivajn tradiciojn.*
5. *En intima kunlaboro kun la socialisma junulara organizajo ĉiuj grupoj kaj gvidorganoj de la esperantistoj klopodas atingi junulojn por sia laboro, per tio kontribuante al la eduko de la junuloj al socialismaj civitanoj.*
6. *La esperantistoj, organizitaj en Kulturligo, partoprenas la organizadon de la spirita-kultura vivo en siaj lokoj kaj loĝteritorioj kaj kunlaboras kun la aliaj fakgrupoj de Kulturligo de GDR.*
7. *Por esti kapabla fari bonan internacian laboron, ĉiu esperantisto strebas daŭre plialtigi krom la politikajn ideologiajn ankaŭ siajn fakajn sciojn.*
8. *La esperantistoj kaj grupoj en Kulturligo de GDR klopodas konvinki ĉiujn amikojn ankoraŭ ne organizitajn por kunlaboro en Kulturligo kaj por la realigo de tiuj gvidprincipoj.*

III.

Ĉi-tiuj gvidprincipoj Validas, surbaze de la decidoj de Kulturligo, por ĉiuj esperantistoj de GDR, kunigitaj en tiu organizo.
Ili fiksas celon kaj taskojn por ties agado. Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR, kontinue gvidas sur la bazo de demokratia centrismo la Distriktajn Laborrondojn, la Subdistriktajn Laborrondojn kaj la grupojn kaj rondojn, kunordigas ties agadon kaj prenas laŭnecesajn decidojn. La decidoj de la superordigitaj gvidantaroj estas devigaj.
Centra Laborrondo subtenas la klopodojn de la grupoj kaj de ties erstraroj peri altan scion pri sociaj bazaj demandoj, bonan lingvo-nivelon kaj solidan fakscion. Ĝi akcelas la esperantomovadon en GDR kaj eldonadas la informilon „der esperantist". Por realigi la starigitajn celojn kaj taskojn al la esperantistoj kaj iliaj estraroj servas i. a. jenaj metodoj:

— *organizado kaj realigo de kursoj por ellerno, kulturado kaj apliko de Esperanto;*
— *individuaj kaj kolektivaj korespondoj;*
— *traduko de aktualaj materialoj pri la evoluo de GDR;*
— *organizado de centraj kaj internaciaj aranĝoj en GDR;*
— *partopreno en internaciaj aranĝoj eksterlande.*

Estas la tasko de Centra Laborrondo reprezenti la interesojn de la esperantistoj de GDR en internacia skalo, teni kaj pluevoluigi ligojn al internaciaj kaj naciaj asocioj.
La agado de la esperantistoj de GDR estos tiom multflanka, interesa kaj rezultoriĉa kiom la amikoj de Esperanto ĝin mem faras.
Ĉiuj membroj de la esperanto-grupoj en la Kulturligo kaj ties estraroj tial estas alvokitaj realigi tiujn gvidprincipojn per vigla kunlaboro.
Decidita dum la Centra Konferenco de esperantistoj de GDR en Kulturligo, la 28an de majo 1972 en Berlin.

---

[1]) *Moderna reakcia teorio, laŭ kiu malaperas diferencoj inter socialismo kaj kapitalismo pro dominado de ŝajne komunaj karakterizaĵoj kaj evolutendencoj (ekz. industriiĝo.) La apologetoj de tiu teorio ne volas vidi la klaskontraŭecon inter ambaŭ sistemoj.*

Detlev Blanke

Esperanto - Utopie oder mehr?

Seitdem in der Zeit des nationalen Bewußtwerdens des fortschrittlichen Bürgertums in Europa auch die Nationalsprachen an Bedeutung gewannen, das Latein aufhörte, die internationale Sprache der Gelehrten zu sein und mit der Entwicklung der kapitalistischen Produktionsverhältnisse die internationalen Kontakte häufiger und vielgestaltiger wurden, erschien vielen großen Gelehrten wie z. B. *Leibniz, Descartes* und *Comenius* die Konstruktion *einer universellen Sprache* oder *Schrift* für wünschenswert. Bis heute gibt es ca. 700 Versuche dieser Art. Nicht selten verknüpfte man mit diesen Projekten die Hoffnung, daß eine solche universelle Sprache Grundlage einer Friedensordnung auf der ganzen Erde werden möge (z. B. *Comenius* mit seiner „Panglottia". Wir wissen, daß eine gemeinsame Sprache nicht gesellschaftliche Konflikte lösen kann. Auch die Konstrukteure dieser Sprache wurden in ihren Vorstellungen auf Grund der gesellschaftlichen Wirklichkeit realistischer, sprachen dann nicht mehr von einer „universellen", sondern von einer *internationalen* Sprache, die *neben der Muttersprache* gelernt werden sollte und so die internationale sprachliche Verständigung in ihrer Verfahrensweise wesentlich vereinfachen könnte.

Interessant und sehr originell sind die verschiedenen Wege, die beschritten wurden, um eine solche internationale Sprache zu schaffen. Da *vereinfachte* man die *klassischen Sprachen,* z. B. das Latein (*Latino sine flexione von Peano,* 1903), warf die Unregelmäßigkeiten moderner Nationalsprachen über Bord und schuf z. B. *„Weltdeutsch"* (Baumann 1915), der Name läßt Ziele sichtbar werden (!), oder man reduzierte ihren Wortschatz auf die wichtigsten Wörter und erhielt die interessanten *Basic-Sprachen,* z. B. *Basic-Englisch* (1935, Ogden). Es gab aber auch Versuche, das internationale Wortgut unter weitgehender Berücksichtigung seiner phonetischen und graphischen Formen in sprechbaren Systemen zu vereinigen (*Occidental 1922,* de Wahl; *Interlingua 1951,* Gode). Und mancher wird auch vom *Volapük* (1880 Schleyer) gehört haben, der ersten funktionierenden bewußt geschaffenen Sprache, die allerdings an ihren eigenen Mängeln bald wieder starb. Auch *Ido* (Beaufront/Couturat 1907) hatte in den 20er Jahren als ein „Reform-Esperanto" gewisse Bedeutung. Dies alles waren Versuche, die nationalen Sprachen mehr oder weniger als Vorbild folgten. Aber es gab auch *philosophische Sprachen,* die eine Klassifizierung aller Begriffe zur Voraussetzung hatten und in ihrer Begriffsbezeichnung sich nicht an internationales Wortgut hielten, sondern willkürlich eigene Wörter erfanden (z. B. *Ro,* Forster 1908).

Wenn auch alle diese Projekte uns Bewunderung für die Originalität der Lösungsvorschläge eines real existierenden Problems abverlangen, so konnte doch nur das Esperanto (1887) des polnischen Augenarztes Dr. L. L. Zamenhof bis heute international Verbreitung und Bedeutung erlangen. Und Esperanto ist zweifelsohne ein Beweis dafür, daß es

1. möglich ist, eine leichte, bewußt geschaffene Sprache für die internationale sprachliche Verständigung einzusetzen, daß sich
2. diese Sprache durchaus dazu eignet, die feinsten Gefühlsnuancen des Menschen, sowie Bedeutungsschattierungen wiederzugeben und
3. der internationale Einsatz dieser Sprache Modelle der Rationali-

sierung der internationalen sprachlichen Kommunikation schafft (Weltkongresse, Seminare und anderen Veranstaltungen ohne Übersetzer), die zur Kenntnis genommen werden müssen.

Es sei auch nicht zuletzt erwähnt, daß schließlich die Marx-Engels-These, daß *„die Individuen ihrerseits auch dies Produkt der Gattung* (die Sprache – D. B.) *vollständig unter ihre Kontrolle nehmen werden, versteht sich von selber“* [1], durch das Esperanto in interessanter und einprägsamer Weise bewiesen wird. Und hier liegt ein weites Forschungsgebiet für Sprachwissenschaftler, Soziologen, Heuristiker, Informatiker und andere Wissenschaftler. Die *Interlinguistik* (Wissenschaft von der internationalen Plansprache) und *Esperantologie* (Philologie des Esperanto) befindet sich jedoch erst im Anfangsstadium ihrer Entwicklung.

Welchen Bauprinzipien folgt nun das Esperanto? Man kann sie wie folgt zusammenfassen

a) die *Grammatik ist regelmäßig*, kennt prinzipiell keine Ausnahme, ist aber dennoch voll entwickelt und ermöglicht eine präzise Darstellung der grammatischen Beziehungen. So gibt es z. B. nur eine Deklinationsart und nur eine Konjugation. Wer Französisch oder eine andere flektierende Sprache kennt, weiß das zu schätzen.

b) Jeder *Buchstabe* wird immer in gleicher Weise ausgesprochen. Wer Englisch kennt, wird diesen Vorteil zu beurteilen wissen.

c) Der *Wortschatz* ist weitgehend *international* und enthält zum überwiegenden Teil die Wurzeln und Wörter, die in vielen Sprachen als Fremdwörter und Internationalismen in großer Zahl auftauchen (kolektivo, filmo, socialismo, produkti, raporti, paroli, interesa, granda, diskreta usw.).

d) Ein *regelmäßiges System von Vor- und Nachsilben* ermöglicht es dem Kenner dieser Sprache, ganze Wortfamilien selbständig zu bilden, was das Erlernen der Vokabeln ungewöhnlich erleichtert und reduziert (skribi, subskribi, enskriba, skribisto, skribejo, skribilo, misskribeti usw.).

Auf Grund dieser Wesenszüge ist die Sprache, wie Experimente bewiesen, ca. *4—5mal schneller erlernbar* als eine der europäischen Sprachen.

Dr. Zamenhof legte 1887 sein erstes Büchlein über die „internacia lingvo“ mit etwa 1000 Wurzeln vor. Das 1970 in Paris erschienene „Vollständige Illustrierte Wörterbuch des Esperanto“ (über 1300 S.) enthält bereits 15 000 Wurzeln, die unter Verwendung der Bildungssilben einen Wortschatz ergeben, der den unseres Dudens um ein mehrfaches übertrifft.

Daß das Esperanto sich *entwickelt*, beweist auch die Tatsache, daß es heute bereits eine *Verslehre*, sowie *Sammlungen von Sprichwörtern* und *Redewendungen* gibt. Denn das literarische Kunstwerk stellt an jede Sprache höchste Forderungen an Ausdruckskraft, Biegsamkeit und Präzision. Häufig wird von Laien ja gerade die Literaturfähigkeit dieser „Kunstsprache“ bezweifelt.. Nun, seit 80 Jahren wird in dieser Sprache *Literatur* verlegt, darunter sehr viele bedeutende Werke der Weltliteratur wie „Hamlet“, „Faust“ (1. Teil), Dantes „Göttliche Komödie“, Andersens Märchen oder Werke von Puschkin bis Scholochow. Das „Kommunistische Manifest“ existiert ebenso in der Esperanto-Fassung wie Lenins „Staat und Revolution“. Ja, selbst dicke Romane und sehr viele Gedichte sind original in dieser Sprache verfaßt worden. Der polnische Linguist *Zenon Klemensiewicz* äußerte einmal, daß die Esperanto-Übersetzung des polnischen Nationalepos „Pan Tadeus“ von Mickiewicz die beste fremdsprachige Übersetzung sei, da u. a. der Rhythmus des Originals treffend wiedergegeben

wurde. Selbst als *Bühnensprache* hat das Esperanto sich bewährt. „Die ehrbare Dirne" von J. R. Sartre, „Die Komödie der Irrungen" von Shakespeare wurden 1963 auf dem 48. Esperanto-Weltkongreß in Sofia auf der Bühne gezeigt. Aber das ist keine Sensation. Denn bereits auf dem 4. Universellen Weltkongreß 1908 in Dresden wurde Goethes „Iphigenie" präsentiert. Und daß Esperanto auch eine *Sprache der Musik* ist, beweisen nicht nur die vielen Schallplatten und Liedersammlungen, sondern auch die Aufführung der polnischen Nationaloper „Halka 1959 auf dem 44. Weltkongreß in Warschau. Seit diesem Jahr sendet *Radio Warschau* täglich auch in Esperanto, wie das 18 weitere Radiostationen aus 15 Ländern ähnlich tun (u. a. Tallin, Gdansk, Sofia, Zagreb, Rom, Bern).

Will man die *praktische Anwendung* des Esperanto darstellen, so muß man hinweisen auf die *Briefverbindungen*, die z. B. Esperantisten der DDR mit ca. 80 Ländern haben. Besonders eng sind natürlich die Verbindungen zur Sowjetunion und den anderen sozialistischen Ländern, wo jährlich 15 bis 20 internationale *Seminare, Zeltlager, Ferienkurse, Sommeruniversitäten* und andere Veranstaltungen zur Teilnahme einladen. Möglichkeiten der interessanten und vielfältigen Anwendung des Esperanto gibt es also genug. Zweifelsohne sind die bereits erwähnten *Esperanto-Weltkongresse* die größten und eindrucksvollsten esperantistischen Ereignisse. Oft besucht von bis zu 5000 Esperantisten (1965 Budapest) aus über 40 Ländern, mit 80 bis 100 Veranstaltungen in einer Woche, ohne Dolmetscher, sind sie überzeugender Beweis von der Kraft und Lebensfähigkeit des Esperanto. Die ständig zunehmende Kompliziertheit der Auswertung international explosivartig anfallender Informationen in ständig mehr Sprachen ist ein Grund dafür, der für die Perspektive des Esperanto zu sprechen scheint. Aber *unabhängig von der Entscheidung dieser komplizierten, aber ernst zunehmenden Frage, lernen und pflegen die Freunde des Esperanto in der DDR diese interessante Sprache in den Gruppen des Kulturbundes der DDR. Aufbauend auf den fortschrittlichen Traditionen des Deutschen Arbeiter-Esperanto-Bundes (Esperanto sei die Geheimsprache der Kommunisten, meinte seinerzeit die Gestapo) nutzen sie das Esperanto zur weiteren Erhöhung des Ansehens ihrer Republik im Ausland, nehmen aktiv teil an der Arbeit der Weltfriedens-Esperanto-Bewegung (MEM), die einen Sitz im Weltfriedensrat hat und leisten ihren spezifischen Beitrag im antiimperialistischen Kampf. Mit einem realistischen Blick für die Möglichkeiten und Grenzen des Esperanto sind sie Mitgestalter ihrer sozialistischen Gesellschaft.*

---

[1]) Marx/Engels: „Deutsche Ideologie" Bücherei des Marxismus-Leninismus, Band 29, Dietz Verlag, Berlin 1960, S. 448.

R e s u m o : La artikolo resumas la diversajn provojn krei universalan respektive internacian planlingvon kaj montras, la bazajn konstruprincipojn de Esperanto. La aŭtoro donas ĉefajn indikojn pri la praktikaj aplikoj de Esperanto.

Ni kore gratulas al nia senlaca aganto, K-do Walter Dietze el Großpösna, okaze lia 70-a naskiĝjubileo (18. 4. 73).

DLR, CLR, red.

Al la membro de la laboraktivo de CLR, k-do Willi Zimmermann, plej **korajn gratulojn** okaze lia 70-a naskiĝjubileo (12. 5. 73). Ni deziras al la jubileulo precipe sanon kaj pluan fruktodonan kunlaboron. CLR, red.

Pri historio de tradukita libro

D-ro Schulze (en la mezo) en diskuto kun bulgarino

Depost la fondo de „Klubo 72“ en Berlin ankaŭ la esperantistoj, organizitaj en Kulturligo de GDR en Berlin renkontiĝas tie regule ĉiun merkredon. Ankaŭ dum tiu ĉi jaro interesa programo allogas pli kaj pli da amikoj de la internacia planlingvo al la agrablaj vesperoj. Lumbildprelegoj pri esperanto-kongresoj kaj -renkontiĝoj, babilado pri kuir-libro en esperanto, informado pri internacia esperanto-gazetaro, lingvaj ekzercoj kaj aliaj distraj temoj kreas bonan atmosferon.

Ankaŭ la vespero, okazinta la 14an de februaro 1973 estis instrua kaj humorplena. D-ro Karl Schulze legis en interesa maniero el sia traduko „Nuda inter lupoj“ de Bruno Apitz, kiu montras la sorton de trijara knabo en koncentrejo Buchenwald (Buĥenvald). Heroe agantaj arestuloj sukcesis savi la vivon de la infano, kiu nun vivas kun la nomo Stefan-Jerzy Zweig. Kelkaj el la arestuloj devis oferi sian vivon por savi la knabeton.

D-ro Schulze ankaŭ rakontis pri la problemoj de tradukado de tia granda beletraĵo. Ĉiu bone, komprenis kiom komplika komence por li estis la traduklaboro. Kelkaj de li donitaj ekzemploj montris tion. Necesis trovi taŭgajn esprimojn ekzemple por la

1. nazia terminaro
2. koncentreja ĵargono
3. la propraj nomoj.

Rilate al la nazia terminaro d-ro Schulze klarigis tiam, kiel li tradukis naziajn rangojn „Obersturmführer“, „Scharführer“ ktpl.

Sufiĉe grandajn problemojn li ankaŭ havis per la koncentreja ĵargono. Jen ekzemple estis nocioj, kiel „Lager, Baracken, Kasino“ kaj aliaj. Por ĉiu nocio li devis trovi taŭgan ekvivalenton en Esperanto. Kiel nomi la internan parton? Kiel nomi la tutan? „Koncentrejo“? Kiel traduki: „Das Lager ist angetreten“? aŭ la vorton „Häftling“? Ĉu preni por ĝi la vorton „arestito“ aŭ „arestulo“ kaj kial? Kiel traduki tian frazon: „Die Gestapo brachte die verhafteten Häftlinge aus dem Lager“?, kies senco estas, ke la Sekreta Ŝtata Polico arestis en la koncentrejo laŭ ĝia opinio suspek-

tajn arestulojn kaj forkondukis ilin eksteren por tie per torturoj pridemandi ilin. Ĉu eblas esprimi tion per la vortoj „La Sekreta Ŝtata Polico forkondukis la arestitajn arestulojn el la koncentrejo“?

Zorgojn li ankaŭ havis pro la propraj nomoj, kiel ekzemple Höfel kaj Pippig. Kiamaniere uzi la akuzativon ĉe tiaj familiaj nomoj?

Tre interesa ankaŭ estis lia rakonto pri la historio de tiu ĉi esperantotraduko. D-ro Schulze ne havis la intencon fari traduklaboron. Li nur tradukis „Nuda inter lupoj“ de Bruno Apitz por ekzerci la lingvon, kiam li 1967 estis rekomencanto. Por ne mem timigi sin per la ampleksa libro, li komencis eltranĉi paĝon kaj tradukis ĝin. Poste li denove eltranĉis paĝon kaj finfine post monatoj li atingis la lastan paĝon de la 445 paĝa libro, kiun eldonis „Universal Reclam Bibliothek“ en germana lingvo. Sed tiu ĉi ekzerco estis tiom streĉa por li, ke li formetis la tradukaĵon „por neniam plu vidi ĝin“. Ni aŭskultantoj havis la plezuron propraokule vidi la akurate distranĉitan broŝuran libron. Por ke ni pli bone povis sekvi lian tradukaĵon li ankaŭ kunportis la bone binditan libron, kiun eldonis „Mitteldeutscher Verlag Halle“ kun eĉ 514 paĝoj por la sama enhavo.

Centra Laborrondo Esperanto (CLR) en Kulturligo de GDR fondiĝis en la jaro 1965. Depost la fondo CLR ankaŭ klopodis pro eldono de beletro. Ĉar 1968 tiurilate alvenis esperiga momento, CLR instigis d-ron Schulze prilabori sian tradukon, ĉar la tradukajo, kiun li faris, kiel rekomencanto, montris lian literatur-tradukan talenton.

Kaj nun komencis por d-ro Schulze la konscia prilaboro de la traduko pro la instigo de Centra Laborrondo Esperanto. Li faris tion. Sed post tio por li estis necesa, ĉion mem tajpi, samtempe ankoraŭfoje fajlante kaj plibonigante sian tradukon.

Tiam estis necese, ke la tradukaĵon provlegu kompetentaj esperantistoj, ĉar tion devis postuli la eldonejo. Tiaj estis

1. Jerzy Grum, Varsovio
2. Erich-Dieter Krause, Leipzig
3. D-ro Peter Wolfgang Ruff, Berlin
4. Walter von Waldowski, Berlin (Okcidento)

Sed nun d-ro Schulze havis la devon prilabori ĉiun unuopan proponon de ĉiu el ili kaj decidi. ĉu akcepti aŭ ne. Ĉio bone sukcesis kaj la eldonejo nun aperigos la libron en Esperanto. Kompreneble bone bindita.

Ĉu ankoraŭ necesas substreki, ke la tradukinto d-ro Karl Schulze faris sian provlegaĵon en agrabla kaj hejmeca formo. Ĝi por mi estis literatura frandaĵo.

Tamen, la libro devas havi multajn aĉetantojn. Tial pripensu jam nun, kiom da libroj vi bezonos kaj aĉetos tuj post la apero de la libro de Bruno Apitz „Nuda inter lupoj“ por vi kaj por viaj korespond-amikoj kaj ankaŭ por niaj vjetnamaj amikoj. Ĉar de tio dependos, ĉu la eldonejo pluajn beletrajn librojn aperigos. Mendu jam nun tuj ĉe via organizo aŭ ĉe via librovendejo la de vi bezonotan kvanton.

Rudi Graetz

Nikolao Kopernik - 500 jaroj

Vojevodia Turisma Informcentro kaj Buroo de Eksterlanda Turismo por Junularo „Juventur" en Bydgoszcz eldonis en Esperanto diversajn faldfoliojn kaj prospektojn pri Nikolao Kopernik, la granda pola astronomo. La materialo estas senpage havebla ĉe Wojewodzki Osrodek Informacji Turystyczny, Bydgoszcz, ul. Zygmunta Augusta, Pollando.

El la broŝureto Nikolao Kopernik, Torunano:

Kopernika revolucio

. . . En Frombork Kopernik observas la astrojn kaj faras kalkulojn, prilaborante sian teorion pri la konstruo de la universo, sed li donas ĝin presi post fortaj petoj de amikoj, nur post kelkdeko da jaroj. Kaj jen en la 1543 j. en Nurenbergo, aperas la latina verko „Nicolai Copernici Thorunensis De Revolutionibus Orbium Caelestium Libri Sex", kio signifas „De Nikolao Kopernik Torunano pri la Rivoluo de la Ĉielsferoj Libroj Ses". Kion enhavas ĉi tiuj libroj, kiuj tiel revoluciigis la tiaman mondkoncepton? La kopernikan teorion de la universkonstruo, en kiu la centran lokon okupas la suno (greke „helios") oni nomas heliocentra — kontraŭe al la reginta antaŭe geocentra teorio, en kiu la movoj de la planedoj kaj de la suno estis okazantaj ĉirkaŭ la tero (greke „gea"). Kopernik konstatis, ke la rigardata movo de la ĉielo, kune kun la steloj, estas nur ŝajna, rezulte de la reala turnmovo de la tero ĉirkaŭ de sia akso dum 24 horoj, kaj ankaŭ el la movoj de la tero ĉirkaŭ la suno laŭorbite dum 1 jaro. Kaj plue, ke la observataj surĉiele translokiĝoj de la planedoj rezultas de tio, ke ĉi tiuj astroj moviĝas laŭorbe ĉirkaŭ la suno kaj observanto-homo vidas ilian movon de sur la moviĝanta tero, estanta unu el la planedoj. La orbitojn de la tero kaj planedoj lokas Nikolao Kopernik sur la heliocentrajn sferojn. La planedoj prezentiĝas en konkreta vico kaj do, komencante de la suno: Merkuro, Venuso, Tero, Marso, Jupitero, Saturno. Pliajn planedojn en la tiama tempo oni ne konis: Urano, Neptuno kaj Plutono estis malkovritaj nur en la XVIII, XIX kaj XX jarcentoj. Malantaŭ la orbo de Saturno lokas Kopernik la sferon de la steloj, opiniante, ke ĉiuj ĉi astroj kuŝas en la sama distanco for de la suno, multe superanta la distancojn en la suna sistemo.

Efektive — el la plej proksima najbaro de la suno, stelo en la konstelacio de Centaŭro, la lumo kuras al ni dum 4,3 jaroj (la rapideco de la lumo estas 300 miloj da kilometroj en sekundo), dum la lumradio de la suno atingas la teron jam post 8 minutoj. Aliaj steloj estas ankoraŭ pli malproksimaj, tial do, ne havante la hodiaŭajn instrumentojn, Kopernik ne povis konstati la diferencojn en iliaj distancoj.

A. Vaitilavičius, Vilnius

RIĈECO DE ESPERANTO KOMPARE KUN NACIAJ LINGVOJ

(Daŭrigo el „der esperantist“ 55/56 kaj F i n o)

Tiu ĉi ankoraŭfoja konstato de ĥaoso en vortfarado de naciaj lingvoj ne haltigas tamen Svadost(on) de atakado kontraŭ Esperanto. Precipe lin ŝokas ofta ripetiĝo de la *pluralaj finaĵoj -aj, -oj,* kiuj memorigas al li interjekciojn de doloro (141 pĝ.). Li citas frazon en Esperanto kun 3 -aj kaj 6 -oj. Sed li tute malatentas, ke la samaj finaĵoj estas tre oftaj ankaŭ en rusa lingvo. Jen citaĵo kun 9-oj: *„On sledil za prostoj maŝinoj, upravlajemoj sloĵnoj avtomatiĉeskoj sistemoj, izobretionnoj slavnoj gruppoj inĵenera K.“* (Li observis la simplan maŝinon, direktatan per komplika aŭtomata sistemo, inventita de la fama grupo de inĝeniero K.) Ankaŭ amasiĝon de aliaj stereotipaj finaĵoj, ekz. la *genetiva -vo (skribata -go),* finaĵo de substantivo de *ago -ije (strojenije ktp.)* ni povas ofte trovi en ruslingva teksto.

Tute vane Svadost citas artefaritaĵon de svisa lingvisto *Bally* kun multaj -ation en kvazaŭa franclingva frazo, ĉar amasiĝon de tiu finaĵo oni povas sen granda peno trovi en natura franca aŭ angla publicistika aŭ scienca teksto.

De la ŝajna riĉeco en la vortfarado — uzado de diversaj vorteroj por la sama celo — naciaj lingvoj subite falas en kompatindan mizeron -uzadon de la sama vortero por diversaj celoj.

Jen la „dolora“ por Svadost finaĵo -oj en rusa lingvo estas uzata por signi nominativon de virgenraj adjektivoj kaj pronomoj, kvar el la ses ekzistantaj kazoj de ingenraj adjektivoj, pronomoj kaj participoj, instrumentalon de ingenraj substantivoj kaj adjektivoj, ne kalkulante jam la nominativan finaĵon de certa nombro da substantivoj kaj ordaj numeraloj. En *„Rückläufiges Wörterbuch der russischen Sprache der Gegenwart“ (H. Bielfeldt 1965),* kie enestas nur nominativaj formoj, mi kalkulis 1054 vortojn kun finaĵo -oj.

La *finaĵon -aj* havas plejmulto de ruslingvaj verboj en volitiva modo kaj certa nombro da substantivoj en nominativo. En litova lingvo tiu ĉi finaĵo estas uzata por signi pluralan nominativon de virgenraj substantivoj, singularan dativon de ingenraj substantivoj, adjektivoj, pronomoj kaj participoj, duan personon de prezencaj kaj preteritaj verboj; la saman finaĵon havas plejmulto de adverboj. Do, la diferenco inter Esperanto kaj la lingvoj rusa kaj litova koncerne la finaĵojn -aj kaj -oj estas nur tia, ke en Esperanto ili estas uzataj regule, kaj en la naturaj lingvoj — ĥaose.

Iom pli regule la finaĵoj -oj kaj -aj aperas en la antikva greka lingvo. Tamen tie ili indikas ne nur la pluralan nominativon de substantivoj kaj artikoloj, sed ankaŭ certajn formojn de verboj. La akuzativa -on en la greka indikas ankaŭ genitivon. En la greka dunombro (dualis) ni trovas ankaŭ la iom malfacile por certaj nacioj prononceblajn finaĵojn -ajn kaj -ojn.

La sonoj -aj kaj -oj estas oftaj ankaŭ en lingvoj germana kaj angla, kvankam tie ili ne servas kiel gramatikaj indikiloj. Notinde tamen, ke certa grupo de germanaj substantivoj akiras en pluralo nome la sonon -oj- en radiko, ekz. *baŭm-bojme, faŭst-fojste. (Baum/Bäume=arbo-arboj; Faust/Fäuste = pugno-pugnoj).*

Do, elekto de tiuj finaĵoj por ofta uzado en Esperanto ne estas hazarda, sed argumentita per sobra analizo de la naturaj fontoj.

Lige kun tio mi deziras mencii, ke ĉiuj gramatikaj finaĵoj de Esperanto (eĉ la kondamnita de idistoj kaj malplaĉa al iuj esperantistoj finaĵo de adverboj -aŭ!) respeguliĝas okulfrape ofte en litova lingvo. Certe, funkcio de la finaĵoj ne ofte koincidas (verŝajne nur la infinitiva kaj la futura de verbo kaj la singulara de ingenra adjektivo, tiu ĉi lasta samas ankaŭ en latina kaj parte en slavaj lingvoj). Tamen tiu ĉi konstato bazigas la konkludon, ke Zamenhof, preninte la „grandajn" eŭropajn lingvojn (francan, anglan, germanan) kiel bazon de vortaro, havis modelon por gramatikaj formoj en la litova, greka, latina kaj en la slavaj. Tiamaniere evidentiĝas, ke ne nur la vortaro, sed ankaŭ la gramatikaj finaĵoj de Esperanto devenas el tute naturaj fontoj, kaj tiusence ĝia riĉeco ankaŭ neniel postrestas tiun de naciaj lingvoj.

Por ilustri bezonon de naciaj lingvoj nutri sin iam per tre nevaria nutraĵo, ni citu germanan kalamburon, konsistantan preskaŭ nur el derivaĵoj de unu vorto *„kommen" (veni): „Es kann vorkommen, daß seine Nachkommen nach Amerika hingekommen mit ihren Einkommen nicht auskommen und daher umkommen"*. Ni traduku: povas okazi, ke liaj idoj veninte al Ameriko ne vivtenos sin per siaj enspezoj kaj pro tio pereos. En Esperanto oni ne bezonas ripeti nek radikojn, nek afiksojn.

Niajn neologismistojn tedas la *mal-prefikso* kaj ili elpensis jam multajn surogatojn anstataŭ la mal-vortoj. Sed naciaj lingvoj vaste uzas similajn prefiksojn kaj al neniu saltis la ideo forigi ilin. Ekz. en franca vortaro mi kalkulis 98 vortojn kun tiu sama mal-, en la angla -ĉirkaŭ 960 vortojn kun similsenca prefikso un-, en la germana — ĉ. 1150 „un" vortojn.

Malriĉecon de gramatikaj formoj en kelkaj naciaj lingvoj montras tiel nomataj helpaj aŭ servaj vortoj por esprimi verbajn formojn, ekz. *haben, werden* en la germana, *bjitj en la rusa, be, have, shall, will, do kaj aliaj en la angla.* Por esprimi certajn formojn de iu verbo oni devas al ĝi aldoni po 2–3 helpaj vortoj, ekz. *ich werde gelesen worden sein (germana) -mi estos legota* — en Esperanto estas esprimata per 3 kaj en germana per 5 vortoj; en la rusa: *ja budu čitatj* — en Esperanto simple — *mi legos.*

En Esperanto ni povas uzi diversajn gramatikajn ilojn por ĉiu vorto senlimige, se nur estas bezonataj konformaj vortoj. Ekz. eĉ el adverboj ni povas formi verbajn, substantivajn, adjektivajn vortojn: *kial, kiali, kialigi, kialo, kiala; nepre, nepro, nepri, nepra, neprigi, nepraĵo, neprema, nepremulo, nepreco, neprigo, nepriĝo* ktp. Ni malofte uzas tiajn derivaĵojn, ĉar ni estas katenitaj de kutimoj en niaj naciaj lingvoj. Kaj la naciaj lingvoj ofte tute neatendite metas „tabuon" por certaj gramatikaj formoj. Ekz. en litova lingvo *pordo, ĉemizo, pantalono (durys, marškiniai, kelnes)* ne ekzistas en singularo, en rusa lingvo *cepo (luk), meblo (mebel)* ekzistas nur en singularo. Pro similaj t. n. „naciaj" ecoj iuj lingvoj oferas klarecon kaj precizecon de parolo aŭ skribo. Ekz. en la ruslingva frazo *„V detskich jaslach bilo ujutno"* (En infanvartejoj estis komforte) ne estas klare, ĉu temas pri unu aŭ multaj infanvartejoj. Tiaj simplaj kaj tre precizaj Esperanto kunmetaĵoj kiel *ellitiĝo, envagoniĝo, elrusigo, litovaĵo, litoviaĵo* — en multaj naciaj lingvoj bezonas kelkvortan klarigon. La tri proksimaj, sed tamen diferencaj nocioj kiel *„leganto, leginto, legonto"* havas en naciaj lingvoj kutime nur unu konformaĵon.

Ekzistas ankoraŭ multaj malperfektecoj de naciaj lingvoj. Oni povus pri tio skribi grandajn volumojn. Sed mi pensas, ke ankaŭ tiuj kelkaj karakterizoj kaj ekzemploj nin konvinkos.

Tamen restas la fakto, ke la vortaro de Esperanto, eĉ iom nenature riĉigita per geografiaj, historiaj kaj personaj nomoj (kion naciaj lingvoj kutime ne prenas en ĝeneralajn vortarojn), konsistigas nur unu volumon (PIV, 1970), kompare kun dekkelkaj aŭ eĉ kelkdekaj volumoj en naciaj lingvoj. Tio ne devas nin malĝojigi, ĉar tio estas pli la rezulto de racia ekonomio de la lingvo ol la malabundeco de vortoj. Ni rememoru ankaŭ kelkajn karakterizaĵojn de naciaj vortaroj, donitajn en komenco de ĉi artikolo. La ekonomio de Esperanto bazas sin sur racia vortfarado.

El la *7 866 radikvortoj,* kolektitaj en la PV, *kun helpo de 33 oficialaj sufiksoj kaj 8 prefiksoj teorie oni povas formi 322 506 vortojn* (laŭ la formulo: unu radiko plus unu afikso), Forminte el ili la fundamentajn gramatikajn kategoriojn (substantivon, adjektivon, verbon, adverbon), kiuj kutime konsistigas la grandajn naciajn vortarojn, ni atingas pli ol unu milionon. Certe, ne ĉiu el la tiel formitaj vortoj havos logikan sencon kaj praktikan valoron. Tamen la eblecoj ankoraŭ obligas per kombino po kelkaj radikoj kaj afiksoj. Ekz. el la vorto *sana,* daŭrigante la derivadon, komencitan de L. Zamenhof en la Fundamento de Esperanto *(52 vortoj),* mi atingis 144 logikajn sencojn, el la vorto patro 50. Aliflanke, ekzistas vortoj, kiuj povas naski apenaŭ unu alian, ekz. pronomoj.

La realan vortaron de Esperanto oni povus elkalkuli multiplikante la averaĝan (mezan) nombron de logikaj derivaĵoj el apartaj gramatikaj kategorioj per nombro de radikoj en la koncernaj grupoj. Ankaŭ sen tia granda laboro, konsiderante la supre demonstritajn ciferojn, ni povas taksi, ke la vortaro de Esperanto enhavas kelkcent milojn da nocioj kaj povas fiere rivali kun tiu de ajna nacia lingvo.

Fine ni provu fari kelkajn ĝeneraligajn konkludojn:

1. *Riĉeco de naciaj lingvoj estas malegala, ĥaosa: ili ie estas tro riĉaj, ie mirinde mizeraj.*

2. *Abunda hominimio kaj polisemio de naciaj lingvoj malhelpas klaran kaj precizan eksporon de pensoj.*
3. *Esperanto laŭ punktoj 1 kaj 2 superas naciajn lingvojn.*
4. *Granda parto de ricaĵoj de naciaj lingvoj ne estas necesa por la internacia, ĉar eĉ por la naciaj ili fariĝis balasto, malhelpanta ekonomian kaj racian uzon de la lingvo.*
5. *En Esperanto oni sentas certan mankon de sinonimoj, aŭ pronesufiĉa ilia sistemigo, aŭ pro reala malesto.*
6. *En Esperanto ne estas solvita la problemo de t. n. flugilhavaj vortoj (frazeologio).*
7. *Por solvi la problemojn menciitajn sub punktoj 5 kaj 6 estas necesa serioza laboro de niaj lingvistoj, unuavice — eldono de vortaroj por sinonimoj kaj frazeologio.*

REEĤOJ
pri „Riĉeco de Esperanto kompare kun naciaj lingvoj"

La Redakcio ricevis multajn laŭdajn leterojn. Nur kelkaj personoj alsendis kritikajn aŭ kompletigajn rimarkojn.

S-ro Zin-Kiyosi (Japanio) skribas: „Leginte pri homonimoj mi ridegis, ĉar kiu havas plejmulte da homonimoj en la mondo, tiu estas japana lingvo".

S-ro A. Holzhaus (Usono) pensas, ke per jena citaĵo el verko de A. Reformatskij „Esperanto kaj similaj lingvoj ĉiam estas duavicaj, t. e. ekzistantaj ekster limoj de stilistiko" la aŭtoro „alportis al Esperanto ursan servon". Kun tia opinio ni ne povas konsenti, ĉar ni ĉiuj devus scii malfavorajn eldirojn pri nia lingvo kaj scipovi ilin rebati. La sama skribinto rimarkis kelkajn tajperarojn en la teksto de la artikolo.

S-ro R. Golden (Hungario) prezentis liston el 30 sinonimoj de *ĉevalo* en angla lingvo, vicon da vortoj kun finaĵo -ess, indikanta inan genron, ekz. *actress, stewardess, tigress,* ankaŭ interesan manieron de indikado de sekso ĉe certaj nocioj de profesio, ekz. *policeman, policewoman; chairman, chairlady; barman, barmaid; doctor, lady-doctor* (laŭvorte: policviro, policvirino; seĝviro, seĝsinjorino; bufedviro, bufedknabino; doktoro, sinjorino doktoro). Koncerne la protesto de s-ro R. G. kontraŭ la tezo, ke angla lingvo estas kreita el ruinaĵoj de kelkaj mortintaj kaj pruntaĵoj de kelkaj vivantaj lingvoj, ni turnis nin por arbitracio al Brita Enciklopedio. La unua frazo, kiun ĝi diras pri *English Language,* tekstas: „Angla lingvo estas karakterizata per ekstreme miksita naturo de ĝia vortaro . . ." (Encyclopaedia Britannica, vol. 8, p. 537, eldono de 1966). Poste sekvas detala analizo, el kiuj mortintaj kaj vivantaj lingvoj ĝi konsistas.

S-ro N. Lock (Anglio) atentigas, ke en angla lingvo instruiston oni povas nomi *school-master* (= lernejmastro) kaj instruistinon *School-mistress* (= lernejmastrino), ke katon oni ofte nomas *Tom cat* (Tomaso-kato), ke la esprimo *way-train* ne estas uzata en Anglio (fakte ĝi estas amerikanismo. *Red.).* Pasero = *sparrow,* prezidanto = *chairman.*

Ni dankas al ĉiuj skribintoj kaj atendas pluajn kompletigojn kaj rimarkojn pri la vere aktuala temo.

La Redakcioj de „Horizonto" de Litovio
kaj „der esperantist"

Vjetnamio rekonstruas, helpu!



Rudi Graetz, rapidege desegnita de k-do Hai Trung, Hanojo.

Jam pasis iom da tempo, post kiam USONO estis devigita al subskribo de la packontrakto kun la tri registaroj en Vjetnamio. La tuta mondo pri tio kontentas. Tamen, la neimageble grandaj detruoj faritaj de la usonaj murdistoj ne povas malaperi en mallonga tempo. Nun necesas certigi, ke la kontrakto estu realigota en ĉiu punkto ankaŭ de la Sajgona reĝimo kaj de USONO. La solidareca kampanjo por Vjetnamio ne ĉesis. Ĝi daŭras, eĉ pli forte. Speciale suferis Demokratia Respubliko Vjetnamio kaj necesas grandaj strečoj de la internacia solidareco, ke la grandparte detruita lando rapide cikatrigu la profundajn vundojn.

Ni ĉe tio kunhelpu! Tial, esperantistoj el GDR, plifortigu vian solidarecon por la rekonstruo de Vjetnamio.

Jam dum diversaj aranĝoj aŭ grupvesperoj oni oferis monon. Inter ili: la 7-a semenario por kursgvidantoj M 218,—. La konferenco de Centra Laborrondo kun la subdistriktaj estroj M 238,—. La Esperantoj-grupoj en Tabarz M 78,50, esperantistoj el Leipzig (Lajpcig) M 53,—. Ĉirilate ni ankaŭ volas laŭdi la proponon de s-ino Löwe el Leipzig, ŝpari por aĉeti la libron „Nuda inter lupoj“ por niaj vjetnamaj esperantistoj. Do — iniciatoj ne mankas.

Ni daŭrigu la solidarecon!

R. Graetz

Alvoko!

Karaj geamikoj en DDR!

Fine de 1973 aperos esperantlingve la libro „Nuda inter lupoj“ de Bruno Apitz. Krom iliaj egoj politikaj penoj la geamikoj el Vjetnamio de tempo al tempo sendas al DDR librojn kaj gazetojn tre bonkvalitajn.

Ni nun per „Nuda inter lupoj“ rekompensu, ĝojigu kaj kuraĝigu ilin, sendonte al ili kelkajn cent da tiaj libroj. Unu ekzemplero kostos ĉirkaŭ 12 markojn.

Kolektu la monon en la grupoj kaj informu CLR pri la sumo!

Ni ĉiuj oferu!

Margarethe Löwe, Leipzig

B. Brecht

Legendo pri la estiĝo de la libro Taoteking sur la vojo de la elmigranta Laotse

L'instruist', kaduka, sepdekjara,
fine al ripozo tre sopiris.
Ĉar bonec' enlanda tre malkara
estis, sed malico alten tiris.
Do al foro li ekiris.

Li enpakis, kion li bezonis:
Multe ne, sed tamen diversaĵon,
Jen la pipon, kiun je vesper' li fumis
jen la libron, lian ĉeflegaĵon,
panon blankan kaj fromaĝon.

Li lastfoje ĝojis sur la vojo
pri la val', tuj forgesante ĝin.
Bovo lia pri la herb' ĉe l'rojo [1])
Ĝojis kaj maĉante portis lin,
ne hastante al la fin'.

Sed post tagoj ie en montaro
doganist' al li la vojon baras:
„Pri valoraj aĵoj nepras nun deklaro!"
Kaj la knab' nur nean geston faras.
Post „Instruis li!" jam ĉio klaras.

Sed la viro, gaja kaj bonvola,
lin demandas: „Ĉu sukcesis tiu?"
Kaj la knabo: „Ke la akvo mola
flue venkas duran ŝtonon, kiu
cedi devas, kiel ĉiu sciu.

Por profiti de la lum'! de l'tago
Nun la knab, la bovon igis salti.
Kaj jam venis ili al la nigra fago.
Jen la vir' spirite povis ŝalti.
„He!" li kriis, „Do bonvolu halti!

Kio pri la akvo, sciencisto,
estas?" „Ĉu ĝi interesas vin?"
Kaj la viro: „Mi nur estas doganisto.
Tamen, kiu kiun venkas, min
interesas. Do rakontu ĝin?

Notu ĝin per 'help' de ĉi infano!
Vi ne devas preni ĝin kun vi.
Estas ink', paper' en la kabano.
Manĝon ankaŭ al vi donos mi.
Jen propono! Ĉu vin plaĉas ĝi?"

Trans la ŝultro la oldulo vidis,
ke la vir' aspektis tre mizere.
Sur la frunto multaj sulkoj sidis.
Ne venkinto estis li envere.
Flustris li „Do vi?" mistere.

Wissenschaftliches Kolloquium über Interlinguistik

Esperanto als Kunst- und Plansprache

Der Kulturbund der DDR, Bezirksleitung Gera, und die Fachgruppe Interlinguistik-Esperantologie beim Zentralen Arbeitskreis Esperanto im Kulturbund der DDR führten am 10. März 1973 im Jenaer Klub ein wissenschaftliches Kolloquium zu Fragen der Interlinguistik durch.

Nach seiner Begrüßungsansprache, in der Dr. Kahle, Bezirksvorsitzender des Kulturbundes der DDR, Gera, auf die Bedeutung des VIII. Parteitages der SED und des 8. Bundeskongresses für die damit verbundene geistig-kulturelle Bereicherung hinwies, sprach Prof. Dr. Spitzbardt als Vertreter des Wissenschaftsbereiches „Marxistisch-leninistische Sprachtheorie" an der Sektion Sprachwissenschaft über „Weltsprachen und Welthilfssprachen". Er erläuterte den 35 Teilnehmern des Kolloquiums Funktion, Bedeutung und Wirksamkeit der natürlichen Sprachen, Kunst- oder Plansprachen (wozu auch Esperanto gehört) und Formalsprachen (d. h. Fachsprachen als Spezialfälle der natürlichen Sprachen). Der Referent betonte, daß die Hauptproblemkreise in der Interlinguistik nur dann erfolgreich erforscht werden, wenn geschichtliche Betrachtungen über die Sprache in die Untersuchungen einbezogen würden und eine Zusammenarbeit von Sprachtheoretikern, Sprachphilosophen, Soziologen und Interlinguisten gewährleistet sei. Auf Esperanto eingehend, das als Kunst- und Plansprache schon in der deutschen Arbeiterbewegung gepflegt wurde und nun seit mehr als 10 Jahren bei uns in der DDR durch den Zentralen Arbeitskreis Esperanto im Kulturbund der DDR als eine Welthilfssprache gepflegt wird, hob er ihren methodologischen Wert für die Maschinen- (Computer-) und Programmiersprache hervor. Esperanto wird zur Zeit von 2 bis 3 Millionen Menschen auf der Welt gesprochen.

Für weitere Untersuchungen zur Funktion und Struktur von Welt- und Welthilfssprachen sowie einer international anerkannten Arbeitssprache unterbreitete der Referent den Teilnehmern des Kolloquiums acht Kriterien zur Bestimmung einer Sprache als Weltsprache, die aber im einzelnen noch quantitativ erweitert und inhaltlich präzisiert sowie statistisch überprüft werden müßten.

Zum Problem „Lerneinheiten in Esperanto und Nationalsprachen" referierte Prof. Dr. Falkenhahn (Berlin). Er verglich sprachliche Erscheinungen unterschiedlicher Sprachen auf der Grundlage von Lerneinheiten und Lernschritten anhand von Anschauungs- und Zahlenmaterial und war der Meinung, daß Esperanto als Plansprache 4- bis 6mal schneller als Fremdsprache erlernt werden kann als eine Nationalsprache.

In seinem Referat „Zum Gegenstand der Interlinguistik und ihrer Bedeutung für die Sprachwissenschaft“ unterstrich D. Blanke (Aspirant, Berlin) die politische und ökonomische Bedeutung der internationalen Verwendung einer bewußt geschaffenen Plansprache. Ihre Weiterentwicklung im allgemeinen und von Esperanto im besonderen stellt die Sprachwissenschaft vor neue Aufgaben, die durch die Interlinguistik bzw. ihren Spezialbereich Esperantologie untersucht werden. Der marxistisch-leninistischen Sprachwissenschaft obliegt es, insbesondere die mit der Verwendung einer derartigen Welthilfssprache verbundenen ideologischen Probleme herauszuarbeiten, wie sie z. B. aus der Analyse des in Holland erschienenen einsprachigen Wörterbuches deutlich wurden. In der regen Diskussion, an der eine Reihe Vertreter der Sektion Sprachwissenschaft teilnahmen, wurden vor allem ideologische und politische Aspekte der Verwendung von Fremdsprachen und ihre Bedeutung für die Entwicklung des proletarischen Internationalismus erörtert.

Die Veranstaltung kann insgesamt als ein wertvoller Beitrag zur Weiterentwicklung der marxistisch-leninistischen Sprachwissenschaft an unserer Sektion gewertet werden. G. H.

(Sozialistische Universität Nr. 6/1973, 29. 3. 1973,
Organ der SED-Parteileitung der Friedrich-Schiller-Universität Jena)

RESUMO

(Raporto en la partia organo de la Universitato Jena/GDR, „Socialisma Universitato“ 6/73. La raporto estas farita de neesperantista lingvisto, partopreninta la kolokvion kp. pĝ. 31.)

La 10-an de marto 1973 okazis scienca kolokvio pri interlingvistiko en Jena. Post enkondukaj vortoj de la prezidanto de Kulturligo, ditrikto Gera, *D-ro Kahle*, kiel unua prelegis *Prof. d-ro Harry Spitzbardt*, reprezentanto de la scienca subsekcio „marksisma-leninisma lingvo-teorio“ ĉe la sekcio lingvistiko, universitato Jena, pri „mondlingvoj kaj mondhelplingvoj“. Li klarigis al la 35 partoprenantoj (plej multaj estis lingvistoj) la funkcion, signifon kaj efikon de naturaj kaj artefaritaj (plan-) lingvoj, substrekante, ke la interlingvistikaj problemoj nur estas solveblaj, se kunlaboros lingvo-teoriistoj, lingvofilozofoj, sociologoj kaj interlingvistoj. La preleganto aprezis la valoron de Esperanto, i. a. kiel programlingvo por komputeroj. Prof. Spitzbardt prezentis 8 plipreciziĝendajn kaj diskutendajn kriteriojn por la selekto de internacia lingvo. *Prof. d-ro Viktor Falkenhahn*, Berlin, prelegis pri „lernunuoj en Esperanto kaj naciaj lingvoj“ kaj komparis la deklinacion kaj konjugacion de Esperanto kun naciaj lingvoj.

En sia referaĵo „pri la objekto de interlingvistiko kaj la signifo de ĝi por la lingvistiko“ *Detlev Blanke* substrekis la politikan kaj ekonomian signifon de planlingvo por la internacia komunikado montrante la taskojn, kiujn havas la marksisma-leninisma lingvoscienco lige al interlingvistiko kaj esperantologio. Ekestis vigla diskuto. *„La aranĝo entute povas esti taksata kiel valora kontribuo al la pluevoluigo de marksisma-leninisma lingvistiko en nia sekcio“.*

7-a seminario por kursgvidantoj

Ĝi okazis, same kiel la antaŭaj en la luksa lernejo de Kulturligo de GDR en Bad Saarow. 38 kursestroj (kaj estontaj), inter ili konsiderinde multaj gejunuloj, dum semajna senpaga restado aŭskultis plej diversajn prelegojn. Kun politika kaj faka enhavoj. Pri la *VIII-a kongreso de Kulturligo* prelegis la prezidanto de CLR, *Rudi Graetz*, sekvita de la sekretario, *Detlev Blanke*, kiu referis pri la *praktikaj realigebloj de la novaj „gvidprincipoj por la laboro de la esperantistoj en Kulturligo de GDR"*.

La aŭtoro de la Esperanto-vortaroj, *Dieter Krause*, prezentis *diversajn leksikologiajn problemojn de la aktuala lingvo*. La aŭtoro de lernolibro, *Ludwig Schödl*, raportis pri *metodikaj problemoj de esperanto-instruado*, ĉerpante el riĉa spertaro. Pri *„Ideologia strukturo kaj perspektivo de internacia esperanto-movado"* prelegis *Detlev Blanke*, ankaŭ tuŝante la ĉefproblemojn de interlingvistiko.

Vespere libervolaj *diapozitivaj prelegoj* trovis la intereson de la plej multaj seminarianoj: *Pri Leningrad (L. Schödl); arabaj landoj (R. Graetz); impresoj de universalaj kongresoj kaj aliaj esperanto-aranĝoj (D. Blanke)*. Tiom pri la fakaj prelegoj. Latinamerikanisto, s-ro *Kurt Kaiser*, ĵus reveninte el la bolanta kontinento, raportis pri la *aktualaj problemoj de la latinamerika evoluo*. La sinjoroj *Wolf* kaj *Kuchinke-Hofer* de la Ministerio pri Eksteraj Aferoj prezentis faktojn pri la evoluo de la *kunlaboro inter GDR, Pollando kaj ČSSR*. Ankaŭ dum ĉi-tiu seminario *Hans Heinel*, membro de CLR, kaptis la plenan strečon de ĉiuj aŭskultantoj pro prezento de *„problemoj de la potencrilatoj en Eŭropo"*. Do riĉa atentonkapta programo. Loterio favore al Vjetnamio donis rezulton de *M 210,—*.

Ĉiutage okazis lingvaj *ekzercoj, kantoj, diversaj amuzoj. 8 seminarianoj sukcese ekzameniĝis*. Sub la ĉarma gvido de *Edeltraud Zettier* la *kursfina festo* fariĝis vere agrabla ĉeesto, por kelkaj obstinaj ĝis la frua mateno.

Malakcepti peton de petanto
la oldulo, ŝajne, ne plu povas.
„Ja meritas", diris li, „demando
tuj respondon. „Frostos nun", la knabo trovas.
„Do paŭzeton ni enŝovas."

Kaj de l'bovo la saĝul' descendis.
Dum sep tagoj skribis nun la du.
Preskaŭ dum deĵor' la doganist' silentis,
zorgis atenteme pri l'menu',
ĝis skribad' ne estis plu.

Kaj al doganist' la knabo donis
okdek unu dirojn je la sekva tag'.
Pro vojaĝdonac' dankinte spronis
tuj la bovon ili al la fag'.
Vere jen ĝentila ag'!

Ne nur danku nun al la saĝulo
pro la verk' donita nun al ni.
Ja necesis, ĝin elŝiri el ĉi ulo.
Al la doganisto danku ni,
ke ĉi tion faris li.

---

[1]) Mallarĝa kaj malprofunda rivereto

Trad. Dr. Karl Schulze

Post la kurso

„La boto estis venenita!

(Der Stiefel war vergiftet)

En teatr/aĵo fama aktoro devis mort/igi murdiston per pistol/pafo. La sceno venis kaj la aktoro kriis al la murdisto: „Fripono, vi murdis mian fraton. Mortu ankaŭ vi!“ Li volis ek/pafi. Sed la pistolo ne funkciis. La reĝisoro mal/antaŭ la kulisoj timis la tondran rid/egon de la la rigard/antoj. Sed la aktoro sciis helpi sin. Li pied/frapis la kontraŭ ulon en la post/aĵon kaj kriis: „Jen, prenu tion! Mi ŝparos mian kuglon!“ La pied/frap/ito kompren/inte la situacion, sin rekt/igis kaj diris: „Ho ve, mi mortos, la boto estis venenita!“ Kaj li „mortis“.

(Die Schrägstriche dienen nur zur Verdeutlichung der Wortzusammensetzung).

Vokabelhilfen: boto – Stiefel; veneno – Gift; fama – berühmt; pafi – schießen; fripono – Lump, Schuft; murdi – (er)morden; morti – sterben; tondri – donnern; sin – sich; pied/frapi – mit dem Fuß treten (schlagen); sin rektigi – sich (auf)richten.

Methodische Hinweise: Lesen Sie das Stück ohne Unterbrechung hintereinander laut vor! Versuchen Sie den Inhalt ungefähr zu erfassen! Erzählen Sie nun die Anekdote mit eigenen Worten auf deutsch nach! Übersetzen Sie die einzelnen Sätze aus dem Esperanto ins Deutsche! Beantworten Sie in Esperanto folgende Fragen:

Fragen

a) Pri kia aktoro temas? b) Kion devis fari la aktoro? c) Per kio li devis mortigi la murdiston? d) Kial la aktoro volis mortigi la kontraŭulon? e) Li ekpafis. Sed kio okazis? f) Kion timis la reĝisoro? g) La pistolo ne funkciis. Kion do faris la aktoro? h) Kiel montris la alia aktoro, ke li bone komprenis la situacion?

Versuchen Sie nun, die Anekdote zusammenhängend und mit eigenen (eventuell auch anderen) Worten in Esperanto **nachzuerzählen,** evtl. auch schriftlich!

G. B. Shaw kaj la fajf/anto

Dramo de Shaw havis grandan sukceson. Kiam Shaw ĉe la fino staris antaŭ la kurteno, la aplaŭdo ankoraŭ pli/iĝis. Post la ĉeso de la ovacio Shaw rimarkis, ke viro sur la galerio fajfas, eĉ fajf/egas. Shaw rigardis supren, kaj per forta voĉo kriis al la fajf/anta viro: – Kara sinjoro, mi ja scias, ke la dramo estas mal/bona. Sed kion ni povas fari du/ope kontraŭ tiu amas/ego? (Fajfi + anta (o) = pfeifend, Pfeifender; kiam = hier „als“; pliiĝi – pli = mehr, iĝi = werden; eg = in fajfegas/amasego (Verstärkung). Achten Sie auf den Gebrauch des Akkusativs: Havis grandan sukceson, ... rigardis supren, schaute nach oben = Richtungsakkusativ (kion ni povas ... was (Akk.!) können wir ... duope – zu zweit.)

(El „ŝercoj, rakontoj“ Budapest 1971)
Bearb. von P. Levsen

INTERNACIAJ ARANĜOJ 1973

Sekve ni prezentas la datojn de kelkaj internaciaj aranĝoj por 1973:

Bulgario

1. Foiro en Plovdiv

En la kadro de la Internacia Specimena Foiro en Plovdiv (Bulgario), de la 8-a ĝis la 10-a de septembro 1973, okazos Esperanto-renkontiĝo.

Informoj ĉe Foira Esperanto-Renkontiĝo PK 184, Plovdiv.

2. „Sano kaj ripozo" en Bulgario

„Sano kaj ripozo" estas feriado por esperantistoj, de la 12-a ĝis la 22-a de julio 1973, organizata de „Balkantourist". Informoj: Esperanto, Pl. Lenin 1, Sofia — C, Bulgario.

3. Ora Esperanto-feriado en Pamporovo en Rodopi-montaro

Tempo 16. — 25-a de septembro 1973

El la programo: ekskursoj, konkursoj, kultura programo, vizito de div. ekspozicioj, kolektado de fungoj k. s.

Loĝo en moderna ripozdomo en Pamporovo.
Kotizoj: 50 levoj.

4. Internaciaj Esperanto-kursoj en Pisanica (Rodopimontaro)

Tempo: 1. — 14. julio 16. — 29. julio
1. — 14. aŭgusto 16. — 29. aŭgusto

Kotizoj: 56 levoj

5. Internaciaj Esperanto-kursoj en Pamporovo

Tempo: 6. — 25. aŭgusto

Kotizoj: 70 levoj

El la programo: Skiado, glitkurado, konkursoj, ekskursoj, muzeo-vizitoj, prelegoj k. s.

Loĝo: moderna ripozdomo

Adreso por la aranĝoj: 3 — 5:
Distrikta Esperanto-Komitato *Smoljan*, Bulgario.

ČSSR

7. 21-a Somera Esperanto-Tendaro (SET) en Lanĉov, ĉe Vranov (kastelo), Ĉeĥoslovakio.

Tradicihava tre bone organizita junulara tendaro en arbaro, ĉe lago, en tre pitoreska ĉirkaŭo.

Programo: La tendaro ligas en si instruadon de Esperanto kun vivo en naturo, sportado kaj amika kunesto. Antaŭtagmeze instruado en kvin diversgradaj kursoj A — D. Posttagmeze banado, sportado, ekskursoj, vespere tendar- kaj babiladfajroj, kantado k. s. La tendaranoj loĝas plejparte duope en tendoj kaj kvarope en kabanetoj.

Tendarkotizo (Kvin manĝoj tage) 490 kronoj.

Loĝo en kabano necesigas krompagon.

Ĉiu tendarano devas frekventi unu el la kursoj!

Ĉiu *eksterlanda partoprenanto* nepre devas havi bonan bazan scion kaj devas partopreni kurson.
La tendaro okazos en du etapoj:
1-a etapo: 15. VII. — 28. VII. 1973
2-a etapo: 29. VII. — 11. VIII. 1973
Jen la adreso: Esperanto-Klubo en Třebič, 674 01 Třebič, Ĉeĥoslovakio

8. Esperantista klubo en Liberec, Ĉeĥoslovakio, organizos ekde 1-a ĝis 14-a de aŭgusto 1973
Someran Esperanto-Kolegion
Ĉiuj partoprenantoj de tiu kolegio loĝos en studenta hejmo de Teksaĵ-industria altlernejo en 2 — 3 litaj ĉambroj.
Loĝado estas luksa. Tiu hejmo situas apud valbarejo, kie vi povos ĉiutage bani kaj naĝi.
Instruado estos ĉiutage (krom dimanĉo) dum 4 horoj antaŭtagmeze. Posttagmeze estos ekskursoj tra belega ĉirkaŭaĵo de Liberec (izera montaro, Luzacia montaro ktp.) Dum la kolegio okazos 2 aŭtobusaj ekskursoj kaj vi povos vidi interesajn vidindaĵojn de libereca distrikto.
Kursoj estos jenaj:
A — Ĉe-metodo kurso por komencantoj (varbu neesperantistojn)
B — Progresinta kurso por tiuj, kiuj jam vizitadis elementan kurson
C — Konversacia kurso por tiuj, kiuj volas plibonigi lingvoscion
D — Porinstruista kurso — ĝi estos finota per ekzameno
E — Retorika kurso por tiuj, kiuj bone posedas la lingvon
Kotizo estas por la tuta kolegio 650 ĉeĥosl. kronoj, por eksterlandanoj 55 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro en okcidenta valuto.
Eksterlandaj partoprenantoj de socialismaj landoj pagos 65 rublojn aŭ egalvaloro en la valuto.
Precizajn informojn kaj sciigon, kiamaniere sendi la monon kaj kompreneble la aliĝilon vi ricevos je la adreso:
Esperantista klubo, postkesto 194, 460 31 Liberec 1, ČSSR.

9. *Printempa Esperanto-renkontiĝo,* de la 27. ĝis 29. 4. 1973 en la montaro Altaj Tatroj, T a t r a n s k á L e s n á, hotel Jánošík.

10. *Somera Esperanto-lernejo,* de la 8. ĝis 22. 7. 1973, D u d i n c e (banloko en suda Slovakio).

11. *Somera Esperanto-lernejo,* de la 15. ĝis 28. 7. 1973, Liptovský M i k u l á š, (inter la montaroj Altaj kaj Malaltaj Tatroj).

12. *Internacia Kulturturisma-semajno* de la 21. ĝis 28. 7. 1973, Banská B y s t r i c a (en montara regiono de meza Slovakio).

13. *Somera Esperanto-lernejo,* de la 29. 7. ĝis 11. 8. 1973, O p á t k a (en orienta Slovakio ĉe valbaraĵo Ružín).

14. *Aŭtuna Esperanto-renkontiĝo* de la 8. ĝis 9. 9. 1973, Dudince.

15. *Vintra Esperanto-renkontiĝo* dediĉita al Ĉeĥoslovaka-Soveta amikeco, komence de decembro 1973, M a r t i n.
Pri la aranĝoj 9 kaj 15 informas kaj aliĝojn akceptas: Esperanto-klubo Košice, Inĝ. Milan Zvara, adreso: Ing. Milan Zvara, Košice, Republiky rád 9, pri la aranĝoj 10, 12 kaj 14, Esperanto-rondeto Dudince, Arnošt Váňa, adreso: Arnošt Váňa, Dudince, okres Zvolen, pri la aranĝo 3 Esperanto-rondeto, Liptovský Mikuláš, Miloslav Rybín, adreso: Miloslav Rybín, Liptovský Mikuláš, Štŭrova 26/e kaj pri 7 Esperanto-klubo Martin, Dr. Ludovít Izák, adreso: Dr. Ludovít Izák, Martin, Rastislavova 13.

Hungario

16. *III-a Vintra Esperantista Ferio* 28. 12. 1973 — 2. 1. 1974 en Budapeŝto
En la programo: urborigardoj, vizitoj en muzeoj, Esperanto-seminarioj, tuttaga ekskurso provincen, Internacia Silvestra Balo.
Partoprenkotizo:
Kategorio A 1000 forintoj (de 1. 1. — 15. VIII.); 1100 forintoj (16. VIII. — 5. XI.) 1150 forintoj (post 16. XI.)
Kategorio B 800, 900 aŭ 1000 forintoj.
Kategorio C 250, 300, 350 forintoj
Bonvolu peti *aliĝilojn* ĉe Budapeŝta Teritoria Komitato de Hungara Esperanto-Asocio, H — 1443 — Budapest, Poŝtkesto 153.

17. *2-a Vinrikolta Semajnfino, Budapeŝto-Horány,*
26. — 30. IX. 1973 (VIS)
El la programo: tuttaga vinrikolta ekskurso, urborigardoj tage kaj nokte, grotoj de Budapeŝto k. t. p.
Partoprenkotizo:
Kategorio A 1000 forintoj (ĝis 30. IV.)
1100 forintoj (post 1. V.)
Kategorio B 850 aŭ 1000 forintoj.
En la kadro de VIS de 29. — 30. IX. 1973 Junulara Esperantista Renkontiĝo
Partoprenkotizo:
Kategorio A 180 forintoj (ĝis 30. IV.) 200 (post 1. V.)
Kategorio B 160 aŭ 180 forintoj
30. IX. estas Denaska Renkontiĝo, kotizo: 30 forintoj
Detalajn informojn ĉe Budapeŝta Teritoria Komitato de Hungara Esperanto-Asocio, H-1443-Budapeŝto, poŝtkesto 153.

18. *1-a Printempa Internacia Renkontiĝo (PIR)* en Balatonboglar
(ĉe Balaton, Hungario) 9. — 11. 7. 1973
Aliĝlimdato: 30. 4. 1973
Prezoj por loĝo kaj manĝo 400 — 600 forintoj, depende de la kategorio.
Antaŭpago je la aliĝilo en ĉiuj kategorioj 250,— ft-oj
Ricevinte la konfirmleteron pri la akcepto de la aliĝo vi tuj sendu la antaŭpagon (en iu ajn valuto) al la poŝtĉekkonto:
„Magyar Eszperantó Szövetsés, 3. sz. Területi Bizottsága H-7601. Pécs Pf 2. N-ro 2908 OTP 240—98003"
Sen antaŭpago la aliĝo ne validas.
Pli detalajn informojn volonte sendas kaj atendas vian baldaŭan aliĝon: Hungara Maro-Esperanto-Grupo, Organiza Komitato de PIR, 8630. Balatonboglár, Könyvesbolt, Hungario; grave: Aliĝilo devas enhavi: nomo, adreso, naskiĝdato, profesio, esperantiĝo en jaro ..., membro de Esperantogrupo en ...
La antaŭpagon mi sendos tuj post la ricevo de la konfirmletero pri la akcepto de mia aliĝilo per poŝto/per bankmandato.

19. *6-a Internacia Renkontiĝo Esperantista de Naturamikoj*
18. — 28. julio 1973 en Abaliget ĉe Pécs
Riĉa programo, ekskursoj, kulturaj prezentaĵoj, feriado en esperantista medio.

La kotizo en kategorioj:		antaŭpago
A en 2 lita motelĉambro	1400 Ft.	400 Ft.
B en 2 lita dometo (por geedzoj)	1300 Ft.	300 Ft.
C en 4 lita dometo kaj turista domo	1200 Ft.	200 Ft.
D en propra tendo	1000 Ft.	100 Ft.

Sen tagmanĝoj la prezo de ĉiu kategorio malaltiĝas per 200 forintoj!
Limdato de aliĝo: Ricevinte la konfirmleteron pri la akcepto de la aliĝo vi tuj sendu la antaŭpagon (en iu ajn valuto) al la poŝtĉekkonto: „Magyar Eszperantó Szövetség 3. sz. Területi Bizottsága" H-7601 Pécs, Pf. 2. n-ro 2908/240—98003.
Sen antaŭpago la aliĝo ne validas.
La ĝiritan antaŭpagon oni ne povas repagi. Vi rajtas disponi tion por la venonta jaro aŭ por alia partoprenanto.
Rabaton (donotan ĉe la alveno) gajnos:
a) Esperantistoj parolkapablaj (por B, C, D kategorioj) 10%-jn
b) Naturamikoj kun legitimilo (por B, C, D kategorioj) 10%-jn
c) Gejunuloj (ĝis la aĝo 25 jaroj) (por C kaj D kategorioj) 10%-jn
Estas gajnebla eĉ 30%-a rabato!
Pli detalajn informojn volonte sendas kaj atendas vian baldaŭan aliĝon: Organiza Komitato de Iren, H-7601 Pécs, Pf. 2. Hungario.

20. *6-a Pionira Internacia Tendumado en ĉarma montara banloko Sikonda en Sudhungario*

La aranĝon povas partopreni infanoj 10—15-jaraj, lernantaj Esperanton. Sub la prizorgado de esperantistaj instruistoj daŭros lingva perfektigado, ludoj, naĝado, ekskursoj, k. t. p.
Informoj ĉe Organiza Komitato 7601, Pécs, Pf. 2, Hungario

Pollando

21. *III-a Esperanto-Feriado en Miedzyzdroje* ĉe Balta Maro, 17.—28. 6. 1973.
En la feriadprogramo estos: ripozo ĉe la maro, amuzaĵoj, interesaj prelegoj, esperantokursoj, ekskursoj.
Fundamentan kaj konversaciajn kursojn gvidos konataj polaj esperanto-instruistoj, matene kaj posttagmeze.
La *partoprenkotizo* estas 1540 zlotoj, kio inkluzivas loĝadon en lignaj somerdometoj, 3-foje tage manĝaĵon, kursojn.
Ekskursoj por 100 Zlotoj.
Eksterlandanoj pagos post la alveno en la kampadejo.
Ĉiu aliĝinto el GDR bezonas, laŭ interkonsento inter CLR kaj PEA, senformalan kvitancon (aŭ subskribon sur aliĝilo) de distrikta, subdistrikta laborrondestro, ke la partoprenemulo disponas pri minimume baza Esperanto-scio kaj membras en Kulturligo.
La aliĝilojn (nomo, adreso, profesio, aĝo, esperantisto ek de ..., konfirmo de distrikta aŭ subdistrikta estro) sendu al „Gromada", 70414 Szczecin, Pl Lotnikow 7.

22. *IX. Internacia Feriado „Ora Pola Aŭtuno"* en Miedzygorze, 16.—29. IX. 1973

Adreso: Pola Esperanto-Asocio, Wroclaw, str. Dubois 3
Partopreno nur por du semajnoj = 330 M
Limdato por aliĝo: 15. julio 1973

23. *Internacia Studenta renkonto „Balta Maro — Maro de la Paco"*
Adreso: Inter-altlerneja Scienca Rondo de Esperantistoj, Gdansk, ul. Waly Jagiellonskie 1

Satiro kontraŭ sat-iro!

Ĉu esperantistoj havas humoron? Ni esperas. Oni prezentos spegulon pri plej diversaj evitindaĵoj, ĉu vi facile vundiĝos? Ni ne esperas.

Ni bezonas sanan kaj bonan satiron! Kiu ne povas ridi pri si mem ne estas enviinda. Sendu satirojn pri la „verda paradizo". Kie regas verdaj flagoj, pensoj, mondskuaj paroladoj je malĝustaj loko kaj momento, kie oni verde diktatoras ... kaj ridindigas nin?

Skribu! Komentu! Satiru!

Kiu komencos?

Jen la komenco:

La instruisto

Ĉiumarde, precize je la 18-a horo li envenis la klubĉambron, pendigis Zamenhofbildon apud la kulturligan emblemon, kraĉotusis, malfermis kajeron kun makulita kovraĵo, direktis la rigardon al verdaj senlimejoj kaj daŭrigis la laŭtlegon de la ĝisnunaj Esperanto-kongresoj.

„La 8-a UK okazis 1912 en Kraków, Pollando,

la 9-a UK okazis 1913 en Bern, Svislando,

la ..."

La 6 fidelaj el iam 15 partoprenintoj ĝemis ŝafpacience kaj komfortiĝis laŭeble en la malmolaj seĝoj. Post dudek minutoj la plej kuraĝa maldecis interrompi la rave legantan per modesta peto pri tradukhelpo en korespondado, ĉar li pli frue devis forlasi la kunvenon. „Ne interrompu min, mi petas", estis la respondo.

„La 24-a UK okazis 1932 en Paris, Francio.

La 25-a UK okazis 1933 en Köln, Germanio ..."

Post la 32-a UK ankaŭ la restinta kvinopo forlasis la kursvesperon.

Sekvantan mardon precize je la 18-a horo li envenis la salonon, pendigis la Zamenhofportreton, malfermis la kajeron kun la ĝissate konata makulita kovraĵo kaj daŭrigis la laŭtlegon. Vane estis provo de kursano, esprimi evidente gravan novaĵon. Rezigne li metis la piedojn sur la tablojn kaj serĉis komfortan kap-apogon por dormeti.

„La 33-a UK okazis 1948 en Malmö, Svedio.

La 34-a UK okazis 1949 en Bournemouth, Britujo ..."

Unu el ni tri, kiu estis veninta akompanita de fremdulo, tamen ne sukcesis dormi. Maltrankvile li moviĝis sur sia seĝo kaj fine malĝentile vokis „Mi volas prezenti al vi gaston de la Fidŝi-insuloj, gesinjoroj!" Scivoleme ni turnis la kapojn, sed la instruisto tuj admonis: „Ne deflankiĝu! Mi volas daŭrigi!"

Post la 39-a UK mi forlasis nerimarkite la kunvenejon kaj iris kun la fidŝi-insulano bierumi kaj babili.

Lastan mardon mi kiel sola fidelulo venis en la klub-domon kaj vidis afiŝon, ke la Esperanto-kurso hodiaŭ okazas en alia salono. Sed jen nia instruisto! Li marŝis rekte en la kutiman salonon, en kiu sidis jam pli ol 30 personoj. Li pendigis la Zamenhofbildon, malfermis la forpeligan kajeron kaj laŭtlegis senkompate kaj persiste:

„La 40-a UK okazis 1955 en Bologna, Italio.

La 41-a UK okazis 1956 en København, Danlando ...“

Murmurado aŭdiĝis. Germanlingve oni vokis: „Pardonu, sed evidente vi misiris la salonon. Ni estas ...“

La instruisto ĉagrene kuntiris la brovojn kaj riproĉis: „Ne krokodilu! Kaj nun aŭskultu:

„La 42-a UK okazis 1957 en Marseille, Francio ...“

Denove germanlingva interrompo. „Vi troviĝas ĉi-tie en fakkunveno de sorĉistoj kaj magiistoj! Malaperu!!“

La parolinto ŝvingis sian sorĉistan bastoneton kaj la instruisto vere malaperis, por ĉiam.

Kaj kiu asertas la kontraŭon, tiu mensogas senhonte!

TOKO

Vizito ĉe amikoj

En la lasta tempo oni multe skribas kaj diskutas pri tio, kiamaniere pliboniĝi la laboron kaj vivon en niaj Esperanto-grupoj. Multe povas helpi starigi kontaktojn kun esperantistoj de niaj najbaraj landoj. Tial la esperantistoj el Berlin-Lichtenberg kun ĝojo akceptis la inviton de la Esperanto-grupo el Pardubice (ČSSR) partopreni feston, kiun oni fine de februaro 1973 aranĝis. Kelkaj anoj de la berlina Esperanto-grupo veturis do al Pardubice. Tie oni tre kore kaj amike akceptis nin. Ĉe komuna kunveno ni priparolis la situacion de la Esperanto-movado en niaj grupoj kaj landoj. Ĉar ekzistis ambaŭflanka deziro plifortigi en estonteco niajn kontaktojn, ni fiksis tion skribe en kontrakto, kiun la prezidantoj de ambaŭ grupoj subskribis. Reciprokaj vizitoj, informado pri la vivo de la grupoj, interŝanĝo de presaĵoj en Esperanto, grupa kaj individua korespondadoj, interŝanĝo de spertoj — tio estas la ĉefaj punktoj, helpontaj al ni pliboniĝi kaj plivigligi la vivon de niaj grupoj. Vespere ni komune amuziĝis, babilante kaj dancante sub akompano de vere ĉeĥa blovorkestro. Eĉ se la vizito de la berlinaj esperantistoj en Pardubice estis nur mallonga, tamen ĝi estis sukcesa. Nun ni kun ĝojo atendas la viziton de niaj ĉeĥaj amikoj en Berlin.

Dieter Berndt



La koruso de la virinvestaĵa fabriko Seifhennersdorf kantas Esperante

Ein gelungener Auftakt:

3-Ländertreffen in Seifhennersdorf

Am 18. und 19. November 1972 war Seifhennersdorf (8000 Einwohner) das Ziel vieler Esperantisten aus der ČSSR, der Volksrepublik Polen und der DDR.

Die Zittauer Arbeitsgruppe Esperanto im Kulturbund der DDR hatte zu einem 3 Ländertreffen eingeladen, und mit großer Freude und Erwartung waren wir nach Seifhennersdorf gekommen.

Alle Eindrücke dieses sehr gut organisierten und gelungenen Treffens schildern zu wollen, ist leider nicht möglich.

Bereits die feierliche Eröffnung im Rathaussaal war ein Erlebnis.

Die Vertreter des Ortes Seifhennersdorf, an der Spitze *Herr Bürgermeister B ö h m e*, sowie *Herr Handelsrat Rudi G r a e t z* vom Zentralen Arbeitskreis Esperanto Berlin, richteten herzliche Worte mit Wünschen zu einem erfolgreichen Verlauf dieser 2 Tage an uns Esperantisten. Danach traten Vertreter der teilnehmenden Länder hervor und überbrachten Grüße und Geschenke ihrer Heimat.

Wir, die Teilnehmer der DDR lernten wieder den Wert des Esperanto kennen. Mit Hilfe dieser internationalen Sprache schlossen wir Freundschaften und erfuhren von den ausländischen Esperantisten viel Wissenswertes über ihre Länder und ihre Arbeit in der Esperantobewegung.

Das Programm dieser 2 Tage war sehr vielseitig. Es gab Beratungen über Freundschaft und Zusammenarbeit, eine Filmveranstaltung, einen Ausflug in die malerische Umgebung, eine interessante Esperanto-Ausstellung in der Halle des Rathauses, einen Unterhaltungsabend mit einem Kulturprogramm. Besonders ist der Chor des Damenbekleidungswerkes Seifhennersdorf hervorzuheben, dessen Darbietungen, überwiegend in Esperanto vorgetragen, großen Beifall fanden.

Ein Höhepunkt war die Gründung der Arbeitsgruppe Esperanto in Seifhennersdorf, bei der zahlreichen Jugendlichen, die bereits einen Anfängerlehrgang absolvierten, feierlich die Mitgliedsbücher des Kulturbundes überreicht wurden.
Diese Gründung ist das Verdienst der *Freunde W a l t e r* und *K i r s c h*, die auch dieses so gelungene Treffen veranstalteten.
Neben dem freundschaftlichen Erfahrungsaustausch der Esperantisten aus 3 Ländern diente diese zweitägige Veranstaltung noch einer bedeutenden Aufgabe: Sie wurde zu einer Manifestation für die Völkerverständigung und für den Frieden in der Welt, durch eine *Protestresolution* an den Präsidenten der USA, durch brüderliche Grüße an die *Pac-defenda-Asocio in Vietnam.* Der Kommission der Sowjetischen Esperantisten wurden zum *50. Jahrestag der Sowjetunion* herzliche Glückwünsche übermittelt.
In der eindringlichen Abschlußrede unseres Esperantofreundes *Helmut F u c h s* aus Pirna kam nochmals zum Ausdruck, daß wir die Sprache Esperanto benutzen sollten, um der Sache des Friedens zu dienen.
Wir 123 Teilnehmer faßten den Entschluß, diesem 3 Ländertreffen weitere folgen zu lassen. Seifhennersdorf hatte den Auftakt dazu gegeben.

Margarete Augustat

Resumo: Raporto pri la trilanda renkontiĝo en Seifhennersdorf suda GDR, 18-an kaj 19-an de Novembro 1972.
Partoprenis 123 Esperantistoj el GDR, ĈSSR kaj Pollando, inter ili ĉ. 80 el eksterlando. Riĉa kulturprogramo kaj tre prestiĝa kadro donita de la eminentuloj de la urbeto mem, donis grandan enurban kaj eksterurban efikon.

Fakgrupo Interlingvistiko/Esperantologio

En n-ro 43 „der esperantist“ (paĝo 6) ni unuafoje raportis en germana lingvo pri celo kaj kelkaj faritaĵoj de la supre menciita fakgrupo ĉe Centra Laborrondo, gvidata de prof. d-ro V. Falkenhahn. Ĝiaj taskoj, estas

1. *instigi sciencajn rondon en GDR okupiĝi pri la sciencaj aspektoj de problemo de internacia planita lingvo ĝenerale kaj speciale pri Esperanto*
2. *Kolekti sciencajn materialojn pri la menciita problemo, kompili bibliografiojn kaj ellabori bazajn sciencajn studojn pri interlingvistiko*
3. *aranĝi sciencajn kunvenojn kaj kolokviojn kun sciencistoj (neesperantistaj)*
4. *se necese, ellabori ekspertizojn pri interlingvistikaj problemoj*
5. *kunlabori kun interlingvistoj kaj esperantologoj el eksterlando.*

Kion faris la fakgrupo depost sia fondiĝo (1970) ĝis nun? La fakgrupo aranĝis ĝis nun *6 sciencajn kunvenojn por* la membroj de la fakgrupo (1-a: *Evoluo kaj aktuala stato de interlingvistiko kaj esperantologio, 2-a: strukturo kaj evoluo de Ido, Interlingue, Interlingua,* 3-a ĝis 5-a: *kunvenoj pri la libro de E. Svadost „Kiel estiĝos universala lingvo?“* 6-a aktuala stato de maŝina tradukado). La kunvenojn gvidis kompetentaj fakuloj. 1972 estis organizita en Leipzig la unua *interlingvistika kolokvio* por neesperantista publiko. Ĝin partoprenis pli ol 40 diversaj interesitoj, inter ili lingvistoj kaj pedagogoj. *D-ro Peter Ruff* prelegis pri *„La lingva problemo en la sciencoj kaj ĝisnunaj atingoj de Esperanto kiel lingvo de scienco“ profesoro d-ro Viktor Falkenhahn pri „Lingvosciencaj konsideroj pri Esperanto“* kaj *Detlev Blanke* pri *„La objekto kaj signifo de interlingvistiko“.*



Profesoro D-ro Viktor Falkenhahn klarigas la problemon de la lernpaŝoj en Esperanto kompare al naciaj lingvoj.

Profesoro V. Falkenhahn 70-jara

Oni ne kredos vidante la profesoron, ke li fariĝis 70-jara. Lia koro ne nur apartenas al la scienco sed same al la junularo. Ĉiuj, kiuj ĥavis la feliĉon rilati kun li, ekŝatis kaj estimas tiun modestan, helpeman kaj tre multflanke kleran scienciston. Kiel gvidanto de la Fakgrupo „Interlingvistiko/Esperantologio“ ĉe CLR li verkis artikolojn, prelegis multfoje antaŭ esperantistoj kaj neesperantistoj kaj helpas senlace al sciencemuloj, kiuj klopodas pri scienca bazigo de la internacilingva problemaro.
Ni deziras al la jubileulo kaj lia familio multe de sano, la realigon de ĉiuj liaj planoj kaj pluan fruktodonan kunlaboron.

CLR, la redakcio

Interlingvistika kolokvio en Jena

La Fakgrupo Interlingvistiko/Esperantologio ĉe Centra Laborrondo Esperanto organizis komune kun la distrikta estraro de Kulturligo Gera, la 10-an de marto 1973, tre interesan sciencan kolokvion, kiun partoprenis *20 sciencistoj* de la *lingvoscienca sekcio de Friedrich-Schiller-universitato Jena.*

Kiel unua referanto, *profesoro d-ro Harry Spitzbardt,* fakulo por indoneza lingvo (Bahasa indonesa), skizis la problemojn de internacia lingvo el vidpunkto de lingvisto substrekante la gravecon interdiscipline esplori kaj solvi la problemon. *Profesoro d-ro Viktor Falkenhahn, Humboldt-Universitato* prelegis pri la *lernounuoj, kiuj necesas por alproprigo de Esperanto kompare al naciaj lingvoj.* Li ilustris sian prelegon per grandaj tabeloj (vidu, foton).

Detlev Blanke resumis la *ĝeneralajn problemojn de interlingvistiko,* komparis la diversajn difinojn kaj speciale montris la utilon de interlingvistiko por la lingvoscienco. Post prezento de la internacia situacio rilate interlingvistiko, D. Blanke faris kelkajn proponojn por la komenco de interlingvistikaj esploroj en GDR. La interesega, serioza diskuto kaj la tuta *7-hora* aranĝo tre klare montris, ke al sobraj sciencaj konsideroj respondos simpatio kaj profunda interesiĝo pri la problemo de IL.

Sekvis diskuto je vere alta scienca nivelo. 1973 sekvos pluaj similaj kolokvioj.

Estis skribitaj kaj pozitive akceptitaj diversaj ĝustigoj de malkorektaj opinioj pri Esperanto. La 18-voluma enciklopedio de GDR, nun aperadanta *„Meyers Neues Lexikon“* entenos difinojn ellaboritajn de la fakgrupo, konsiderinda sukceso. *Nacilingvaj studoj* en sciencaj revuoj aperos kaj jam estas akceptitaj.

D. B.

Nia regula XIV-a BET (29. VII. - 6. VIII. 1972)

La mastroj-organizantoj de la XIV-a Baltlanda Esperanto-Tendaro (BET) ĉijare estis estonoj. La Tendaro estis aranĝita en unu el la plej pitoreskaj kaj allogaj anguloj de la lando — en vilaĝo Häädemeeste, Pärnu-distrikto, situanta ĉe la bordoj de Balta Maro kaj rivero Pärna.

Krom baltlandanoj la tendaron ĉeestis reprezentantoj el pluraj respublikoj de tuta Sovetunio. Sume aliĝis 170 personoj.

Malferman paroladon faris s-ano J. Ojalo — prezidanto de Talina E-klubo. Interalie il notis la fakton, ke post la enkonduko de fakultativa instruado de Esperanto en iujn mezlernejojn, al BET alvenas multaj novaj fortoj — la junularo. Estiĝas do tre bonvena la rolo de la instruistoj de Esperanto. Akre aktualiĝas la neceso, ke la baza afero de la programoj de BET estu ĉefe la lingva demando. Kaj vere dum la tuta tempo de la tendaro kiel ruĝfadeno manifestiĝis ĝuste la atento pri akiro de pli profundaj lingvokonoj. Ekde la unua tago post la malfermo organiziĝis E-kursoj, triklasaj: A-klaso (instruis inĝ. M. Mandrik, blankruso), B-klaso (instruis pedagogo A. Rogov, ukraino), C-klaso (instruis doc. B. Tokarev, ruso). La C-klasanoj faris ekzamenojn kaj ricevis specialajn diplomojn kun la rajto instrui la lingvon.

En la tendaro estis ankaŭ la tradiciaj programpunktoj: funkciis E-ekspozicio, kies enhavon estigis variaj libroj kaj periodaĵoj, krome, kiel subfakoj — „Ekperanto en estonaj nuntempaj periodaĵoj“, „Estintaj BET-oj“ (fotokroniko, kies aŭtoro estis la fervora BET-fotisto s-ano A. Straumanis). „Laboro de la Klaipeda E-klubo“. Starigante la ekspozicion multe da koro enmetis ges-anoj Alma Lekko, Eliza Ojaste kaj A. Munak.

Gravan dignon al la tendaro aldonis la funkcianta Somera Universitato kun rektoro doc. B. Tokarev. Estis faritaj la jenaj prelegoj: A. Tood — „Kio estas Häädemeeste?“, J. Ojalo — „K. Peterson — la unua estona poeto, 1801—1822“, A. Vellner — „La tradicioj de niaj esperantistoj“, A. Ĥarkovskij — „La lernolibro de d-ro A. Skalskij“, B. Tokarev — „Psikologio de la instruado“, A. Rogov — „Prepozicio de en Esperanto“, A. Vaitilaviĉius — „Pri la sinonimoj en Esperanto“, A. Masenko — „La blinda poeto A. Eroŝenko“, B. Tokarev — „La originala prozo en Esperanto“.

Dum la tempodaŭro de la tendaro okazis fakkunvenoj de instruistoj, naturamikoj, junularo. Dum vesperkrepuskoj oni ĝuis kelkajn koncertojn: varie prezentis sin la trupo de la Riga E-klubo de Blinduloj, direktata de nia poetino L. Jevsejeva, bonsukcese improvizis Klaipeda E-klubo k. a. Ĉiutage manifestiĝis jen tiaj, jen aliaj programeroj. Sed oni ankaŭ ne preteratentis la ripozon, la distrojn. Estis organizataj interesoplenaj ekskursoj al la antikva estona urbo Pärnu; la tendumantoj ĉiutage svarmis sur la mar-strandoj, konkurante okupi la platŝtonegan „liton“; okazis piknikoj al mirindaj pinarbaraj anguletoj; dum la vesperkrepuskoj lignofajroj, dancoj, ludoj, komunaj kantadoj altiradis precipe la junularon. La murgazeto estis „tonodonanta barometro“. Interalie per aparta rubriko ĝi vipis „la krokodilojn“.

En la tendaro regis vere amika kaj samideana atmosfero. Kazaĥoj el Alma-Ata, rusoj, ukrainoj, blankrusoj fratiĝadis kun estonoj, latvoj,

„Juna amiko - nova revuo!

Jen, kio jam longe sentiĝis kiel serioza manko en ĉiu kurso: interesa facillingva legaĵo, kiu servu al la progresintoj kiel „Paŝoj al plena posedo“. Kaj la kursestro mem ofte baraktas kun la problemo, kiel vivigi la lekciojn, kiel fari ilin pli interesaj, pli variaj.

„Juna amiko“, internacia lerneja Esperanto-revuo, aperis fine de 1972 per provnumero. Ĝi estas dediĉita al junaj lernantoj, sed absolute same kaptas la intereson de la pliaĝuloj. Sur 24 paĝoj, samformataj kiel „der esperantist“, kun multaj trafe elektitaj ilustraĵoj, ĝi prezentas vere tre multflankan legaĵon: pri Pablo Picasso kaj la packolombo, Islando — lando de kontrastoj, olimpika flamo, rakontoj pri ansero kaj aglo, hungara komponisto Kodaly kun kanto de li, biografio de Paul Robeson, enigmoj, magia tabelo, anekdotoj, koresponddeziroj k. a. La ĉefredaktoro estas la ĝenerala sekr. de Hungara Esperanto-Asocio, Bela Bercely. En la redakta komitato estas kunlaborantoj el preskaŭ ĉiuj socialismaj ŝtatoj, krome el Nov-Zelando, Brazilo, GFR, Japanio, Islando, Anglio, Francio, Svislando.

Granda avantaĝo estas, ke la lingvaĵo de ĉiuj tekstoj baziĝas je la 1000 plej oftaj vortoj. Ĉiu alia vorto estas klarigita per noto. La revuo estos abonebla ĉe CLR, kaj en la estonto verŝajne eĉ per la poŝto. Ĝi aperos 5 foje, kajero po 24 paĝoj, kaj kostos 6 markojn.

Ankaŭ de via abonemo dependas la sorto de la revueto. Do ne hezitu, sendu kune kun aliaj kursanoj kaj amikoj senformalan deklaron al CLR, ke vi pretus aboni al „Juna amiko“. Via distrikta kaj subdistrikta laborrondoj ricevis ekzemplerojn de la provnumero. Petu ĝin por ricevi impreson pri la eldonaĵo.

---

litovoj, poloj, judoj. Ĉiuj, ŝajne, portadis en sia koro la konatan eldiron de Henri Barbusse: „Strange estas por internaciistoj ne paroli internacian lingvon.“

En la ferma kunveno la Organiza Komitato de la XIV-a BET oficiale transdonis la malhisitan flagon al la litova delegacio, ĉar la XV-a BET en 1973 okazos en Litovio. La tendarado finiĝis per amika balo, iniciatita de la litova delegacio per la tosto: „Dankon al la esperantistaro estona!“

(Laŭ Juzefine Baliene, iom konzigita el „Bulgara Esperantisto“)

Esperanta skisemajno sur monto Sitno

La 4an ĝis 11-an de februaro en suda Slovakio sur monto Sitno okazis la 1-a Esperanta skisemajno de la junularo. En alteco de 1011 metroj super marnivelo, tie, sur la neĝkovrita pinto de Sitna kunvenis 15 Esperantaj geamikoj el Ĉeĥoslovakio kaj el GDR. La plej aĝa estis la 64-jara „juna" Vána kaj la plej juna estis 5-semajna knabeto, alportita surdorse en dorsosako. La vetero estis bela, la ĉirkaŭo pitoreske blanka de slovaka neĝo. Sperta slovaka ski-majstro instruis skikuradon. Vespere oni kunsidis babilante, kantante Esperantajn kaj naciajn kantojn kaj aŭskultante sinjoron Vánan, kiu rakontis multe pri la historio de Sitno kaj ties ĉirkaŭaĵo.

Sitno en la praepoko estis vulkano. En la mezepoko sur ĝia supro staris fortikaĵo kaj nuntempe tie troviĝas turista kabano. De sur Sitno estas videblaj Danubo kaj Altaj Tatroj kaj sube multaj vilaĝoj, ankaŭ la kastelo de Antol, iama posedaĵo de la bulgara ekscaro Ferdinando — nun kun fama ĉasista muzeo. Sitno havas la saman klimaton kiel la banejo Nový Smokovec en Altaj Tatroj.

La belaj tagoj forflugis tro rapide. Kiam oni adiaŭis de sinjoro Vána kaj de bela Slovakio — nun kiel gebrunuloj — oni faris tion nur malvolonte. Dankon ankoraŭfoje al la karaj slovakaj geamikoj speciale al sinjoro Vána, la Esperanta Paĉjo, kiu helpis fari la belegajn tagojn neforgesebla rememoro. La afableco, la oferema helpemo kaj gastameco de la slovakaj homoj postlasis profundajn impresojn. Se vi sopiras pri silento kaj soleco, veturu al Sitno. Ĝia tuta ĉirkaŭo estas kvazaŭ kreita por ripozo. Eble ni renkontiĝos venontan vintron? Do, ĝis revido en Slovakio!

Laŭ Gabi Müller, studentino, GDR

Instruistaj aranĝoj en la kadro de la Hungara Kultura Festivalo

La VI. Kunordiga Konferenco por Enkonduko de Esperanto en Lernejojn, okazis 18.—19. julio 1972, Budapeŝto.

La ĉefa demando, kiun la VI. Kunordiga Konferenco por Enkonduko de Esperanto en Lernejojn traktis, estis la stato de la pedagogia didaktika eksperimento (PDE). Kiel sciate, la III. Kunordiga Konferenco en Maribor (1970 j.) decidis, ke oni komencu devigan instruadon de Esperanto en kelkaj lernejoj de la 5 kunlaborantaj landoj (Aŭstrio, Bulgario, Hungario, Italio, Jugoslavio). Dum la pasinta 1971/72 lernojaro tiu instruado komenciĝis en 22 lernejoj kun 594 lernantoj: en Bulgario — 2 klasoj kun 50 lernantoj (en Veliko Tàrnovo kaj Popovo), en Hungario — 9 klasoj kun 215 lernantoj, en Italio — 3 klasoj kun 85 lernantoj kaj en Jugoslavio — 8 klasoj kun 244 lernantoj (Serbio — 2 klasoj kun 67 lernantoj, Kroatio — 2 klasoj kun 59 lernantoj kaj Slovenio — 4 klasoj kun 118 lernantoj). La PDE en ĉiuj ĉi menciitaj lokoj ekmarŝis bone. Aŭstrio ankoraŭ ne aliĝis al PDE, ĉar la kleriga ministerio ne aprobis uzadon de la parte hungarlingva lernolibro de prof. d-ro J. Szerdahelyi. Nun, pro la apero de nova, tute internaciigita lernolibro de la sama aŭtoro, tiu baro jam malaperas.

Dudek jaroj da fruktodona laboro de Somera-Esperanto-Tendaro (SET) en Lanĉov

En la jaro 1952 sur la malgranda duoninsulo enmeze de la lago de la Vranova akvobaraĵo *Paŭlo Sittauer* organizis kun siaj tiamaj 17-jaraj geamikoj unuafoje Someran Esperanto-Tendaron.

Post kelkaj jaroj oni trovis mirindan lokon proksime al la vilaĝo Lanĉov, kie oni eksterordinare sukcesis plibonigi la kondiĉojn de jaro al jaro. La kursojn komence vizitadis 12—15-jaraj geknaboj. Eĉ la geinstruistoj ne estis multe pli aĝaj. Dum tiuj meritplenaj 20 jaroj la nombro de la vizitantoj kreskis. La 2-semajnajn E-kursojn ĉiujare forlasas proksimume 300 kontentaj partoprenintoj.

En SET krom la ĉeforganizanto, s-ro Sittauer instruas bone konataj geinstruistoj kiel D-ro *Černý, profesoroj Tichy kaj Kraft,* s-ro *Chvosta,* Inĝ. *Felix Staňura* kaj aliaj. Ne malpli grandan meriton havas s-ro *Karlo Franz,* kiu ĉiujare laboreme organizas la geinstruistaron.

Laŭ la ĝisnunaj kalkuloj, el Lanĉov eliris ĝis nun proksimume 4000 da gelernantoj kaj centoj da geinstruistoj.

Kiel oni sukcesis atingi tiajn rezultojn?

La kialo estas en la oferema, grandicza laboro, nome — krom la kuiristoj, ricevadantaj modestan salajron — ĉiuj laboras senpage, sed kun des pli granda entuziasmo. Rezulte la restado estas la plej malkara en ČSSR. Kompreneble, mi ne povas neglekti la favorajn kondiĉojn flanke de la romantika arbarriĉa regiono. Ĉion en la tendaro la „loĝantoj" faras mem laŭ sia fantazio — ĉu temas pri seĝoj, tabloj, ornamaĵoj k. s. Oni ĉiutage preparas tendaran fajron kun propra interesa programo.

Oni organizas konkurson por „Verdaj kastoroj", kiuj sendepende de la lingvoscio ne parolas nacilingve dum 1—2 aŭ eĉ pli da tagoj. Por ĉiu tago ili ricevas „premion". Krom tio la „loĝantaro" organizas diversajn sportajn konkurojn, šip-ekskursojn, turistajn ekskursojn al Znojmo, Býtov, Vranov, Lednice kun historiaj muzeoj.

Kiel longjara partopreninto de SET en Lanĉov, mi havas la plej profundajn impresojn pri la tagoj tie travivitaj. Do estu al mi permesite gratuli kaj danki — en la nomo de ĉiuj kontentaj kursanoj — al ĉiuj organizantoj nomitaj aŭ nenomitaj, kiuj dum tiuj 20 jaroj aldonis sian entuziasmon por fari la tendaron tiel sukcesa. Samtempe mi dankas al ili pri la amika kunlaboro kaj deziras al ili ankoraŭ pluajn multjarajn sukcesojn.

Dezidero Koronczy, Prievidza
(El „Esperanto Slovaka" 7/8 1972)

Rostocker Esperantisten in Szczecin

Nachdem polnische Esperantisten aus der Wojewodschaft und Stadt Szczecin im April 1972 Gast der Esperantogruppe Rostock waren, fuhren, die Rostocker am 21./22. 10. 1972 zu einem Gegenbesuch nach Szczecin und informierten sich über das Leben der polnischen Freunde sowie über den imposanten Wiederaufbau der im Kriege zerstörten Stadt. Von der dortigen Esperantogruppe und ihrer Vorsitzenden Palica herzlich begrüßt, verlebten sie zwei interessante Tage.

Im Offizierklub wurden die Gäste u. a. vom *Vorsitzenden des Rates der Stadt Szczecin, Herrn Bernhard Majchrzak,* sowie dem *Vorsitzenden des Polnischen Esperanto-Bundes, Stanislav Svistak,* herzlich begrüßt. Dem verstorbenen hervorragenden *Rostocker Kommunisten und alten Arbeiter-Esperantisten Robert Stoll* war eine Schweigeminute gewidmet. Der Vorsitzende der Rostocker Gruppe überreichte ein Bild der Ostseestadt als Geschenk der Rostocker Esperantisten.

Die Szczeciner Freunde hatten mit Unterstützung des Rates der Stadt ein vielseitiges Programm vorbereitet. So hat u. a. eine Jugendgruppe unter Leitung von Mgr. Brožlkiewicz Chansons in Esperanto dargeboten. Eindrucksvoll war auch die Stadtbesichtigung sowie die Hafenrundfahrt, die noch einmal bewußt machte, welche großen Zerstörungen der faschistische Krieg angerichtet hatte. Aber es fand sich auch Zeit für den Erfahrungsaustausch beider Esperantogruppen.

Werner Plate, der Sekretär des Bezirksarbeitskreises Esperanto Rostock, hielt einen Farbdiavortrag über die sozialistische Entwicklung Rostocks, der vielen polnischen Esperantisten Anregung gab, recht bald ihre Rostocker Freunde zu besuchen.

Der Besuch der Rostocker Esperantisten in Szczecin war ein voller Erfolg. Es sei den Szczeciner Freunden für ihre Gastfreundschaft recht herzlich gedankt. Die allseitige Vertiefung der Freundschaft und Zusammenarbeit beider Völker ist ein Anliegen ihrer Parteien und Regierungen und damit auch der Esperantisten. Sie haben den Vorteil reibungsloser sprachlicher Verständigung. Bald werden die polnischen Freunde Gäste der Ostseemetropole sein.

(Nach Berichten von W. Plate und G. Jäger)

Bem. d. Red.: Welche Gruppen folgen diesem guten Beispiel?

Resumo: Esperantistoj de Rostock/GDR vizitis Szczecin/Pollando. Ekevoluis tre firmaj amikecaj kontaktoj inter ambaŭ urboj.

Modela agado

La partoprenintoj de la esperantista amikecvojaĝo 1972 al Leningrado, Ludwig Schödl, Neuruppin, kaj Richard Rabenalt, Rathenow, tre efike laboris por la pliprofundigo de la soveta-germana amikeco.

Richard Rabenalt 12-foje prelegis per diapozitivoj al pli ol 300 aŭkultintoj. Ludwig Schödl havis pli ol 550 aŭskultintojn en 17 prelegoj.

„La kvardekunua“

La Komisiono pri internaciaj ligoj de sovetaj esperantistoj, Moskvo, eldonis en esperantlingva teksto la ĉefverkon de la granda soveta verkisto Boris Lavrenev, „La kvardekunua“.

Boris Lavrenev, verkante dum pli ol kvardek jaroj rakontojn, novelojn, teatraĵojn kaj romanojn, elektis kiel temojn prefere al gloran kaj senkompromisan batalon de la revolucio. La nun al la internacia esperantistaro transdonita novelo raportas pri la sorto de ruĝarmea taĉmento marŝanta tra la senlima, vintra sablodezerto ĝis al la bordo de l'Aral-maro, desegnas la oferplenan batalon por la nova sociordo, por la venko de la socialismo. Koincide kun la 50-a datreveno de la fondo de Soveta Unco ĉi tiu novelo ankaŭ hodiaŭ havas aktualecon kaj meritas la atenton de ĉiu literaturamiko.

La tradukinto uzis tre interesan propran stilon. Vivplenaj vortpentraĵoj pruvas en konvinka maniero la riĉecon de la internacia lingvo kaj la neelĉerpeblajn esprimeblecojn perhelpe de ĝia vortfarado.

Do, kie estas lumo estas ankaŭ ombro. Evidente la tradukinto ne sufiĉe priatentis la postulon, ke Esperanto devas esti flue legebla, ke la tekstoj devas esti klaraj kaj facile kompreneblaj. Jen estas kelkloke la traduko pro troiga abstrakteco de diversaj vortformoj por multaj legantoj tro komplika.

Kelkfoje la leganto staras antaŭ lingva enigmo, kiel devas pruvi la sekvonta frazo sur paĝo 10: „. . . stopis per histrikita de fusiloj kun bajonetoj homa knedaĵo“.

Plue la tradukaĵo enhavas vortkunmetaĵojn neordinarajn kiuj formas nekutimajn vortbildojn, p. e. sur paĝo 43: „etridi = rideti“. Ambaŭ formoj estas uzitaj en la sama tekstparto. Aŭ ĉu ĝi estas unu el la preseraroj (ekridi), kiuj troviĝas ne malofte en la teksto aldone malfaciligante la legfluon. Alia ekzemplo troviĝas sur paĝo 12: „pendesegni = desegni kun peno“. Kial la tradukinto ne uzis „pene desegni“, ĉar la unuan momenton direktiĝas la leganto al la verbo „pendi“.

Certe ĉiu progresema Esperantisto aprobas la uzon de neoficialaj vortoj, se ili estas necesaj. Nur ŝajnas ke en „la kvardekunua“ tro multaj tiaspecaj vortoj „toporo, onisko, gofrita, ĥalatoj kaj tiel plu“ sennecese ĝenas tujan komprenon.

Malgraŭ la menciitaj mankoj tamen estas la novela traduko vera fonduso en lingva kaj ankaŭ soci-historia rilato.

Erich Würker

Insigno de MEM

Tre belan insignon de MEM oni fabrikis en Ĉeĥoslovaka Socialisma Respubliko. Ĝi estas tre bonkvalite farita kaj ricevebla por 6 kronoj ĉe Ĉeĥa Esperanto-Asocio, poŝtkesto 8, 12000 Praha 2.

INFORMOJ

Kiel gasto ĉe ĉeĥaj fervojistoj!

Dum la 18-a kaj 19-a de novembro 1972 okazis en Česka Trebová la jarkunveno de la Fervojista Sekcio ĉe ČEA.

Mi havis la eblecon partopreni kaj povas konstati, ke la ĉeĥaj kolegoj kaj samideanoj ĉion tre bone preparis. Sabato la 18-an ni ekskursis komune per aŭtobuso al la urbo Litomysl por viziti malnovan kastelon kaj la naskiĝdomon de la mondfama komponisto B. Smetana. Tiu vizito montris al la partoprenantoj la historian riĉecon de tiu ĉi parto de Ĉeĥujo.

La amuza vespero kun dancado donis al ni la eblecon interparoli kun la ĉeĥaj, hungaraj kaj aŭstriaj kolegoj pri diversaj demandoj. Ni interŝanĝis pensojn por plibonigi la kunlaboron inter la fervojistoj-esperantistoj de ambaŭ landoj kaj povis konstati, ke inter ČSSR, GDR kaj Hungario estas multaj komunaj interesoj kaj eblecoj.

Dimanĉe, la 19-an, okazis la jarkunveno. Ĉe la malfermo infangrupo montris popoldancojn kaj kantis popolkantojn en tre belaj popolkostumoj, ili ricevis fortan aplaŭdon de la ĉeestantoj. Poste kantrondetoj de la Esperanto-grupo de Česka Trebová kantis diversajn Esperanto-kantojn en tre bona maniero. La prezidanto, kolego Jiři Piśtora, donis raporton pri la laboro de lasta jaro, en kiu li montris la sukcesojn kaj malfacilaĵojn en la evoluo de la movado. Post la raportoj de diversaj komisionoj komencis la diskutoj.

D-ro Bacskaj el Hungaruĵo montris en sia diskuto al ĉiuj ĉeestantoj la signifon de la kunlaboro kun ĉiuj sociaj, ŝtatoj kaj fakoj organizoj por plibonigi la evoluon de nia movado, kiel gravan taskon. Li diskutis ankaŭ pri la signifo de faka kunlaboro inter la landaj ligoj. Mi dankas al la ĉeĥaj kolegoj por la granda gastamo.

Hans Diedrich

Rim. de la redakcio: Ĉiuj kunlaboremaj fervojistoj-esperantistoj de GDR bv. sin anonci ĉe Centra Laborrondo por ebligi fondon de fervojista komisiono.

Dresdena vespero en Vroclavo

1972 okazis en Vroclavo „Dresdenaj tagoj" kaj Vroclavaj Esperantistoj aranĝis „Dresdenan vesperon". Ili invitis la Dresdenan grupon partopreni en tiu aranĝo.

Ni, la Dresdenanoj, kiuj partoprenis en tiu aranĝo, bone preparis nin. Ni transdonis salutleteron kaj donacojn al niaj polaj amikoj. Krome ni montris per lumbildoj kaj sonbendo al niaj amikoj la tre vidindan ĉirkaŭaĵon de nia urbo.

Ni ankoraŭ foje dankas al niaj gastigintoj por la afabla gastemeco, kaj ni ĝojus pri revido en mao 1973 okaze de Vroclavaj tagoj en Dresden.

Evelin Berndt

El ČSSR

Pro sia bonego porpaca laboro la esperanto-grupo el Melnik, gvidata de la prezidanto de ČEA-s-ro Vitek, ricevis oficale la titolon „Pacdefenda Esperantista Grupo en Melnik".

La 25-an de novembro 1972 en Kultura Domo „Song" en Praha la Esperantista klubo Praha festis sian 70-jaran jubileon.

INFORMOJ

400 partoprenantoj
en la Esperanto-Universitato

Preskaŭ 400 personoj el 14 landoj partoprenis 1972 la jubilean X-an Someran Esperanto-Universitaton en Gyula (Hungarujo). Diversaj artobjektoj, variaj amuzeblecoj, strand-, kurac- kaj terminbanejoj donis plezuron, amuzon kaj ripozon al la vizitantoj. Dum sep tagoj la aranĝantoj certigis universitatnivelan programon al la partoprenantoj.

(El Heroldo)

Sub la signo de amikeco

Jam la duan fojon ĉijare aŭdiĝis la Internacia Lingvo de sur la teatra scenejo en Ĉeĥoslovakio. Post la prezentado en Liberec ĝi okazis la 22-an de oktobro dum la 6-a internacia esperantista renkontiĝo en Mělník (21.—22. 10.) apud Praha. La Ŝtata Pupteatro el Košice (orienta Slovakio), venkinto de la E-pupteatraj festivaloj en Zagrebo prezentis tie „Aventuroj de Guignol" de la polaj aŭtoroj L. Moszcynski kaj J. Wilkowski en la Esp. traduko de E. V. Tvarožek. Por sia arto kaj perfekta lingvo la geaktoroj rikoltis abundan aplaŭdon de pli ol 250 spektantoj, grandparte eksterlandaj gastoj el Germana Demokratia Respubliko, Pollando, Hungario, Jugoslavio, Aŭstrio kaj Japanio.

Dum la paŭzo la prezidanto de la loka EK ĉe ZDŜ Jungmannovy sady s-ano Josef Vítek transprenis honortitolon „Pacdefenda Esperanto-Grupo", kiun atribuis — por la unua fojo en ĈSSR — al tiu ĉi sukcesa Esp. rondo la Distrikta Packonsilantaro. Ĉeestis la ceremonion laŭreato de la Ĉs. pacpremio s-ano T. Balda, la reprezentanto de CK ĈEA J. Drlík kaj delegitoj de la eksterlandaj karavanoj.

Oficiala honorigo de la E-grupo en Mělník estas alta rekono de ties aktiva porpaca laborado precipe en la lastatempa kampanjo de la ĉs. esperantistoj helpe al la vjetnamaj amikoj.

O. Knichal

PEA — CLR — traktadoj

La reprezentantoj de Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR, Rudi Graetz (prezidanto), Detlev Blanke (sekretario) kaj Jürgen Hamann (distriktestro por Leipzig) intertraktis la 21-an kaj 22-an de decembro 1972 kun reprezentantoj de Pola Esperanto-Asocio pri „Kontrakto pri kunlaboro inter ambaŭ organizaĵoj".

Ankoraŭ haveblas ĉe CLR la bonega „Poŝatlaso de la mondo" el ĈSSR.

TEJO EN MOSKVO

Estas karakterize por la lasta evoluo de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), ke ĝi ne evitemas gravajn internaciajn problemojn de la socia evoluo. Kaj kiu volus kontesti, ke ĝuste la junularo mem tutmonde alfrontas la plej diversajn sociajn problemojn, kiuj devas esti solvataj. Pli kaj pli ofte internaciaj junularaj organizoj prenas pozicion pri la urĝaj problemoj de la nuno, kaj da ili sufiĉe ekzistas. Pasintjare en Stockholm junularaj organizoj konferencis pri la gardo de la hommedio kaj en aŭgusto en Helsinki ili parolis pri problemoj de eŭropa sekureco. Ambaŭ konferencojn partoprenis TEJO, samrajte kaj efike atentigante pri la lingva problemo kaj subtenante la progresivajn celojn de la konferencoj. Establiĝis bonaj kontaktoj al multaj neesperantistaj internaciaj organizaĵoj, inter ili al la prestiĝa Monda Federacio de Demokrata Junularo (MFDJ). Tiuj rilatoj kaj kontaktoj certe pli utilis al la diskonigo de faktoj pri la lingva problemo kaj Esperanto ol centoj da kursoj. Tamen, kursoj devas esti, mi substrekas por eviti miskomprenojn. Fine de la jaro 1972 en Moskvo okazis unu el la sendube plej gravaj internaciaj junularaj konferencoj: „La monda renkontiĝo de la laborula junularo" de la 1-a ĝis 15-a de novembro 1972. Partoprenis tiun konferencon pli ol 500 gvidaj funkciuloj de 130 naciaj kaj 20 internaciaj organizoj. Kaj inter la internaciaj estis TEJO, reprezentita per sia 1-a vicprezidanto d-ro Hans Eichhorn, la ĝenerala sekretario d-rino Flora Szabo-Felsö kaj la sekretario de la GDR-TEJO-sekcio Detlev Blanke. De 1-a ĝis 9-a de novembro la tri delegitoj, speciale kune kun afrikaj delegitoj faris studvizitojn en Riga, la ĉefurbo de Litovia SSR, partoprenis riĉan kulturan programon, diversajn mitingojn, la demonstracion okaze la 55-a datreveno de oktobra revolucio kaj havis aliajn neforgeseblajn impresojn pri Moskvo. En multegaj individuaj interparoloj kun delegitoj el plej diversaj landoj ili klarigis la starpunkton de TEJO pri la lingva problemo kaj la sociaj problemoj de la nuntempo. En ĉiuj kongresaj dokumentoj TEJO estis menciita kaj eĉ havis la eblecon prezenti sian starpunkton en la kadro de la tria laborkomisiono, kiu okupiĝis pri „Solidareco kaj kunlaboro de la laborula junularo en la batalo kontraŭ imperiismo, por paco, demokratio, nacia sendependo kaj socia progreso". La kontribuo aperis en la oficiala kongresa dokumentaro. Cetere, ĝi estis komencita en Esperanto kaj daŭrigita germane kaj simultane tradukita en ses lingvojn (ruse, germane, angle, france, hispane, arabe)!! Speciale afrikaj delegitoj tre interesiĝis pri la prezentitaj problemoj, ĉar, laŭ ili, internacia lingvo malpliigus la influon de la imperiaj lingvoj (la angla kaj franca) tiel donante al la evoluo de la propraj afrikaj kulturoj kaj lingvoj pli da samrajtaj eblecoj kaj sendependo.

Resume: La reprezentiĝo de TEJO en Moskvo estis tre sukcesa, alfrontigante multajn junulorganizojn kun Esperanto kaj tiel vekante intereson pri la laboro de TEJO kaj la solvo de la lingva problemo.

D. Blanke

INFORMOJ

Bulgara esperantisto abonebla en GDR

La konata 24-paĝa esperanto-revueto „Bulgara esperantisto“, oficiala organo de Bulgara Esperanto-Asocio (BEA), ek de 1973 estas laŭ interkonsento kun BEA abonebla en GDR. La 12foje dum jaro en Esperanto revuo larĝe informas pri la Esperanto-movado en Bulgario kaj internacie. Estas konate, ke la bulgara Esperanto-movado modele laboras, estante unu el la plej fortaj movadoj (eventuale eĉ la plej forta) de la mondo. De ĝiaj atingoj ĉiu esperantisto el GDR povas lerni. La amika kunlaboro inter esperantistoj de GDR kaj Bulgario daŭre plifundiĝas. Do uzu la eblecon laŭ jena maniero.

1. Peranto estas por BE Otto Lauckner, 828 Großenhain, Robert-Blum-Straße 9. Li kolektas la abonojn.

2. Nur estas akceptataj jarabonoj. La unuajn numerojn de la kuranta jaro ankoraŭ ricevos tiu, kiu tuj anoncos ĉe s-ro Lauckner sian abonon. Unu tutjara abono kostas 9 markojn (inkluzive administraj kostoj por la peranto). La sumo estas sendenda rekte al Otto Lauckner, Kreissparkasse Großenhain Konto-Nr. 4992-42-30537.

Do uzu la eblecon aboni plian esperanto-revuon de amika socialisma lando!

Filmoj en Esperanto

GDR produktis du kolorajn filmojn en Esperanto:

„Hieraŭ ni ankoraŭ estis infanoj“. (Sinkronizis Rudi Graetz, Dr. Eichhorn, Hella Sauerbrey, Renate Berndt, Detlev Blanke), 40 minutoj, 16 mm.

2. „Nia lando“ (sinkronizis Detlev Blanke), 30 minutoj, 16 mm.

Solenaĵo de internacia Virina tago

Nia distriktestro Jürgen Hamann konsideris kiel honoran taskon inviti amikinojn el Vjetnamio. Li sukcesis. El la Leipziga „Herder“-Instituto partoprenis nian kunvenon je la 7a de marto 3 amikinoj, kiuj studadas tie ĉi.

Ĉeestis ĉirkaŭ 30 geesperantistoj. La estrino de nia laborrondo, s-ino Greif, malfermis la klubvesperon salutante kaj bonvenigante la gastojn kaj niajn liganojn. La distriktestro prezentis la vjetnamajn amikinojn.

S-ino Gruhle faris festoparoladon pri la heroeco de la vjetnamaj virinoj germanlingve; ĉar niaj gastoj ne scipovis Esperanton. Sed la germana interparolado estis sufiĉe bona, kvankam niaj vjetnamaj studentoj nur ĵus eklernis la germanan lingvon.

Regina Boas deklamis la poemon „la mutulino“ el la revuo PACO.

Nia estraro transdonis al la gastoj malgrandajn memoraĵojn, krome el kolektado favore al Vjetnamio rezultis 53,— markoj.

La studentinoj prezentis nacian kanton.

La estrino premiis la funkciulinojn Kopietz, Gruhle kaj Boas.

La distriktestro faris la finparoladon invitante niajn gastojn okaze de konvenaj aranĝoj kaj rikoltis aplaŭdon pro la novaj interrilatoj kun Vjetnamio pere de la vjetnamaj studentinoj.

Oskar Stolberg

INFORMOJ

4-paĝa intervjuo en „Freie Welt“

En n-ro 50/1972 de „Freie Welt“, ilustrita semajna revuo de la Asocio por Germana Soveta amikeco aperis 4-paĝa intervjuo pri Esperanto kun la sekciestro por Esperanto en la ĉefoficejo de Kulturligo de GDR, Detlev Blanke. Krome estis prezentita interparolo kun la konata soveta esperantisto, redaktoro de „Pravda“, Konstantin Michailowitsch Gussev el Moskvo.

La intervjuo, bele kaj sprite prezentita, donas seriozan superrigardon pri la utilo kaj neceso de la internacia lingvo Esperanto. Laŭ la amplekso ĝi certe estas unu el la plej grandaj, post la dua mondmilito en ilustrita revuo aperinta intervjuo pri Esperanto. Kelkaj ekzempleroj ankoraŭ haveblas ĉe CLR.

Junularo

Jen la titolo de 60paĝa riĉe ilustrita broŝuro, kiun eldonis eldonejo „Zeit im Bild“ prepare al la X-a Monda Festivalo de Junularo kaj Studentoj en Berlin. La broŝuro donas tre varian superrigardon pri la vivo, la problemoj, revoj kaj atingoj de la junularo en GDR. Ĝi kostas du markojn.

Enciklopedio de Esperanto

Ĉiuj kontribuoj por Enciklopedio de Esperanto, nun preparata plurvoluma leksikono sub la aŭspicioj de UEA, venantaj de esperantistoj el GDR, bezonas la konfirmon de Centra Laborrondo.

Korrigieren Sie bitte in „der esperantist“, Nr. 55/56:

S. 28 Hans Heinel ist nicht Diplomphilologe, sondern Diplomphilosoph.
S. 27 Die Überschrift muß richtig heißen: „La logika konstruo de Esperanto ĉe unu ekzemplo“.

Wir bitten um Entschuldigung.

Ora folio — 72

Unu el la plej interesaj eventoj de la Tutunia junulara festivalo en la kolektivo de entrepreno „Radiotekniko“ fariĝas la internacia renkontiĝo — seminario „Ora folio — 72“ en Kesterciems, apud marbordo de Riga golfo de Latva Sov. Soc. Respubliko. Ĝin organizis la stabo de kampiroj laŭ la lokoj de revolucia, batala kaj la glora laboro, kaj Esperanto klubo „Radieto“. La seminario komenciĝis per la amikec-vespero de la popoloj de Sovetunio, dum kiu en la multvoĉa horo sonis voĉoj de gastoj el Tula, Leningrad, Tallin, Tartu, Vilnius, Šaŭliai, Aluksne, Jelgava. Por la alia tago estis planitaj samtempe du aranĝoj. Konkurado en la laŭregiona sinorientiĝo kaj koncerto de amatora arto. La koncerta programo enhavis ankaŭ la trarigardon de amatoraj filmoj pri esperantistaj aranĝoj en diversaj urboj de la lando.

Kio koncernas la priparolon de speciale priesperantaj problemoj, ĝi tuŝis niajn plej aktualajn zorgojn. Priparolita estis la laborplano de la kluboj, la plej spertaj el ili peris siajn spertojn en la organiza agado.

Kiam la programo estis elĉerpita, estis nomitaj la laŭreatoj de komuna konkurso: la unuigita teamo de Tula — Tiĥvino, leningradanoj kaj la plej etaj partoprenintoj, la etaj oktobranoj de mezlernejo en Aluksne.

A. Medinŝ. La prezidanto de klubo „Radieto“
Ĉerpita el Sov. molodej de 3/decembro 1972 T. A.

Esperanto kaj filatelo

Informoj pri novaj poŝtaj e-stampoj dum la jaroj 1971/72 en Pollando. La numeroj respondas al la sta-katalogo de Burmeister.

90	Poznan	1971	8. 3.	Internacia tago de virinoj
91	Krakow	1971	13. 6.	Koperniko / Kunveno E-fila klubo
92	Poznan 2	1971	13.—22. 6.	Jubilea foiro en Poznan
93	Miedzydroje	1971	22.—29. 6.	E-feriado apud Balta Maro
94	Bialystok 1	1971	17.—20. 7.	Tria kulturfestivalo de E-junularo
95	Krakow 1	1971	7. 11.	E-literatura pioniro Grabowski
96	Kartuzy	1971	15. 12.	Internacia Tago de E-libro
97	Sopot 1	1972	2. 2.	„Lernu Esperanton“
98	Sopot 1	1972	20. 2.	Semajno de Amikeco
99	Poznan	1972	8. 3,	Internacia tago de virinoj
100	Sopot 1	1972	4. 4.	Fila-ekspo / Kunveno E-fila-klubo
101	Sopot 4	1972	5. 4.	E-muzeo / 12a kunv. E-instruisto
102	Poznan	1972		Internacia foiro (datoj mankas)
103	Torun 1	1972	16. 7.	28-a TEJO-kongreso
104	Gdansk 1	1972	25. 7.	Postkongreso kun seminario
105	Sopot	1972	12. 8.	60 jara jubileo de 1-a poŝta E-stampo
106	Sopot 1	1972	23.—26. 8.	Internacia festivalo de kanzonoj
107	Miedzygorze	1972	20.—22. 9.	8-a E-feriado (Ora aŭtuno)
108	Oswiecim	1972	30. 9.	Simpozio „E en filatelio“
109	Krakow 1	1972	1. 10.	kiel nro 105 (8a UK 1912 en Krakovo)

La E-himno en poŝta stampo!

Okaze de la internacia festivalo de kanzonoj, okazintan 23.—26. 8. 1972 en Sopot/Pollando, la poŝto uzis dulingvan memorigan stampon. Por ni interese, ke la muziknotoj en la stampo prezentas ne iu ajn modernan danc-kanzonon, sed . . . la E-himnon. (Kiel konatiĝis, oni nun en junularaj rondoj treege ŝatas kanti la E-himnon . . . laŭ la melodio de „ras-dva-tri kasaĉok” sub ritma man-klakado.) Ankaŭ interesa por la E-filatelistoj estas jena poŝta stampo de 7. 11. 1971, uzita en urbo Krakovo, kiu memorigas pri la patro de la E-literaturo A. Grabowski. Jam eblas helpe de aliaj poŝtaj stampoj pri la „tago de la E-libro“, efike prezenti k dokumenti E-literaturon pere de filatelo. *Burmeister*

Kie en GDR estas E-filatelistoj?

Unuigeblus filatelistojn en GDR, kiuj hobias E-filatelon. Celo: Interŝanĝi duoblaĵojn, freŝdatajn informojn, aperigi bulteneton, okazigi fila-ekspoziciojn pri Esperanto okazigi prelegojn en fila-kluboj pri E en filatelo, instigi kaj proponi poŝtajn memorajn stampojn kaj pm en aŭ pri E (UdSSR, Pollando, ČSSR, Hungario, Jugoslavio kaj Bulgario jam havas „siajn“ e-pm).

Aperigi artikolojn en filatela ĵurnalo „Sammler-Express“. Interesuloj sin turnu al nia komisiito por filatelaj aferoj: R. Burmeister, 9033 Karl-Marx-Stadt, Wilhelm-Wolff-Str. 1.

Richard Rabenalt — 70 jara ora Becher-medalo

La 21-an de januaro Richard Rabenalt fariĝis 70 jara. En Richard Rabenalt kuniĝas la kvalitoj de klaskonscia komunisto kun la nelacigebla entuziasmo por la internacia lingvo Esperanto. Estro de la Distrikta Laborrondo, li klopodis sukcese meti la multfacetan aktivadon esperantistan en la servon por la utilo de socialismo kaj GDR. Speciale intimajn rilatojn k-do Richard flegas kun sovetuniaj esperantistoj. Ne estas mirinde, ke la Asocio por Germana Soveta Amikeco lin plurfoje distingis. Richard Rabenalt ricevis pro sia bonega kultura laboro pere de Esperanto la oran Johannes R. Becher medalon, la plej altan distingon de Kulturligo de GDR.
Ni deziras al la jubileulo, kiu cetere ĉijare ankaŭ festas sian 50jaran esperanto-jubileon, multe da sano kaj sukceso en la plua aktivado per kaj por Esperanto.

CLR, redakcio

Mi rimarkis ... Mi rimarkis ... Mi rimarkis ... Mi rimarkis ... Mi

Abonu la gazetojn!

Estas stranga kontraŭdiro. Ofte iuj plendas, ke ili ne povas aboni tiun aŭ jenan gazeton, kompreneble temas pri gazetoj el la okcidentaj landoj. Demandite ĉu ili jam abonis ekzemple „Paco", „Hungara Vivo", „Pola Esperantisto", Homo kaj kosmo", ĉiuj aboneblaj en GDR, surprize sed vere, ofte ili neas. Jam „esperantisto" serioze deklaris al mi, ke nur de tempo al tempo li aĉetas en la grupo „der esperantist", kaj krome oni ja ne povas ĉion aboni. Nu, eble. Sed tiam oni ne ŝajnigu seriozan intereson pri Esperanto. En grupo de 14 personoj antaŭnelonge farita testo rezultigis, ke nur 3 el ili abonas „Hungara Vivo", unu el la plej bonaj esperanto-revuoj. La samo konstateblus rilate la aliaj revuoj. Parenca problemo videblas ĉe la literaturvendo, aŭ pli bone „nevendo". Denove iuj krias pri nehavebla ĉe ni literaturo. Sed prezentante riĉan esperanto-libran oferton oni tamen, kun miro. konstatas, nur malmultaj aĉetas.

Ĉu vi tion komprenas? Mi ne.

— ulo —

Konferenco de Centra Laborrondo kun subdistrikoj

La 3-an kaj 4-an de marto 1973 okazis grava konferenco de Centra Laborrondo kune kun la subdistrikoj. D-ro Mertink, ligo-sekretario de kulturligo, referis pri „Paca kunekzistado kaj ideologia klasbatalo". Sekvis interesa kaj profunda diskuto, montranta la praktikigon de la aŭdita por la laboro de la grupoj. La dimanĉa antaŭtagmezo estis dediĉita al la praktikaj problemoj de la grupoj.
Komence la prezidanto de Centra Laborrondo Rudi Graetz raportis pri siaj impresoj el la VIII-a kulturliga kongreso (komp. paĝo 2) kaj speciale pri la sufiĉe favora reprezento de la esperantistoj dum la kongreso kaj en kongresmaterialoj.
La sekretario de CLR, Detlev Blanke, resumis kelkajn problemojn el la praktika laboro de la Esperanto-grupoj kaj ties gvidantaroj. Monkolekto por Vjetnamio rezultigis 238,— markojn.
Pri la multaj problemoj de la grupoj ni raportas en unu el la sekvaj numeroj.

Kuŝanta tigro

Eldonejo „Eesti Raamat" Talinn aperigis malgrandformatan luksan libreton kun ilustrita kovrilo kaj kvar ilustraĵoj. La internajn kovrilpaĝojn ornamas griz-nigraj pentraĵoj de Picasso (aŭ laŭ P. ?). Tiu ĉi decenta gustoplena eldono bonege konvenas al la 14 rakontoj de la ŝatata estona verkistino Lilli Promet sub la titolo „Kuŝanta tigro". Ili pritraktas preskaŭ nerimarkeblajn eventojn, delikatajn sentojn, profundajn pensojn kaj homajn motivojn, kiujn oni kutime prisilentas. Ĉiu rakonto instigas al enprofundiĝo kaj pripensado. La leganto mem estas devigata, serĉi la internajn motivojn, sortojn aŭ solvojn. Tiom da rakontoj — preskaŭ tiom da demandoj: Kial la iama kantisto perdis sian racion? Kial la nekatenita aglo ne forflugas? Kial la oficiro de la germana armeo postulas nur unu respondon de Pablo Picasso? Kial silentas la koloroj al Picasso? Kial la germana militkaptito ne plu venis? Kiam mi estis traleginta la libron mi tuj denove komencis ĝin legi kaj nun post kiam mi duafoje estas leginta, ĝin la interna esenco ankoraŭ ekfloris pli bele. Ĉu ne la amo de Madame Louise superas ĉiujn imagojn pri amo?
Ĉe la rakonto „Vandaloj" mi ne trovis la ĝustan respondon. Kia problemo! Kiel oni povas eduki infanojn el abomeno je militkrimoj kaj soldata bruteco? „Neĝulo" estas senproblema rakonto — bildeto pri degela vetero — nura naturpriskribo.

La „Versfaranto" estas unika parabolo. Mi tre bedaŭras, ke mi ne povas legi la aliajn prozaĵojn de Lilli Promet, kiuj jam pli frue aperis, ekzemple „Nur pro pura amo", „Disĉiploj de la sankta arto", „Rozkolora ĉapelo" aŭ iu alia.

Hella Sauerbrey

„Por la Paco" XI 1971

Nur hezite mi decidis legi la XI-an numeron de „Por la Paco" eldonita en Moskvo 1971.
Kial?
Estas al mi malagrable kaj streĉe legi tiajn malgrandajn presliterojn.
T'amen mi ne bedaŭras mian decidon. Mi konatiĝis kun detaloj de iama kaj nuna soveta historio, scienco kaj arto.

La 87 paĝojn entenanta modesta kajero komenciĝas per la „Deklaro de la Soveta Registaro" pri la problemo koncernanta kunvokon de konferenco inter la nuklearmilo-havaj ŝtatoj, daŭriĝas kun la „Manifesto de Asembleo de la Tutmonda Packonsilantaro" de Budapeŝto dum aprilo 1972 kaj la apelo al ĉiuj internaciaj kaj naciaj organizaĵoj de batalantoj, militveteranoj, anoj de la rezist-movado, malliberuloj de faŝistaj prizonoj kaj koncentrejoj fare de Soveta Pacdefenda Komitato kaj Soveta Komitato de Militveteranoj. Sekvas kelkaj rakontoj pri herooj de la granda Patria Milito.
Impresa estas la raportaĵo de Lawell Tomas (Ukono) pri Siberio sub la titoloj „Admirinda Nuno", „Fantazia Estonto", „Grandioza Skalo", „La Gravitcentro" kaj „Aŭdacaj Planoj".

Ne mankas poemoj, skizoj, nek kanto nek porinfanaj paĝoj! Por mi mem la plej valoraj eroj estas jenaj: La memoraj vortoj pri vivo kaj agado de estimata Profesoro Bokarev, la raporto pri Sejt-12 (E-tendaro en Baŝkirio) kaj la notoj de G. Korotkevič pri siaj konferencaj tagoj en Berlino.
Resume: La kajero publikigas porpacajn klopodojn kaj montras la disvolviĝon kaj disfloron de Soveta Unio. Helpe de ĝi la Esperantistaro povas konatiĝi kun sovetaj homoj, problemoj intencoj kaj politikaj klopodoj. Oni povas rekomendi tiun ĉi legindan kajeron!

Hella Sauerbrey

Tre bonaj estas la kontaktoj inter la junaj esperantistoj el Ziemeri, Latvia SSR kaj la lernejo Züssow, ĉe Greifswald. La foto montras la lernejanojn el Ziemeri okaze solidareca aranĝo por Vjetnamio.

„La horloĝisto de Djen Bjen Fu“

estas la titolo de volumo de elektitaj vjetnamaj noveloj, aperinta 1971 en Hanojo. Tiu ĉi titolo ne precize karakterizas ĝian multflankan enhavon. Pli bone oni povus titoli ĝin „Aventuroj kaj homaj sortoj en milita tempo“. Sed oni ne atendu nur glorajn priskribojn de herooj aŭ famaj batalantoj! La noveloj pritraktas simplajn homojn en ĉiutagaj cirkonstancoj kaj preskaŭ nerimarkeblajn heroecojn de simpluloj el la periodo 1945—1964. Ĉiu novelo estas mosaikŝtono de la multflanka danĝerplena vjetnama vivo. Oni konatiĝas kun la nova kooperativa vilaĝa vivo en al liberigita zono same kun la pramalnovaj kutimoj de la popolo kaj la mirinde alloga beleco de la pejzaĝo: „La adoptitino“, „Du fratinoj“ kaj „Vivo de artisto” estas tre delikatsentaj psikologiaj rakontoj, kiuj konatigas nin kun la enkreskiĝo en la novan kadron de la socialisma erao.

Kompreneble la plej multaj noveloj pritraktas militajn incidentojn kaj emociigajn kortuŝan heroaĵojn de la plej diversaj homoj kaj viroj kaj virinoj kaj infanoj, kiuj nur vivas por pli bona socio sur libera kaj sendependa tero.

Ne estas facile, prijuĝi, kiu novelo plej bone plaĉis al mi. Ĉu „La gardisto de lumturo“ de Biu Duc Ai, kiu montras per la sorto de nur unu homo la tutan historian evoluon de la lastaj jardekoj, ĉu „La geedzoj A Tu“ de To Hai, ĉu „Lunhelo sur la arbaro“, en kiu Nguyen Mink Chau rakontas la penan vivon de batalantaj kondukistoj de ŝarĝaŭtoj aŭ ĉu „Patrina koro“ de Vu Le Mai aŭ „Sur la Vojo Nro 1“ de Xuan Trink.

Ĉi komence mi diris, ke la noveloj ne priskribus heroecojn? Mi eraris! Ili nur priskribas heroecojn. Ĉar ĉiuj homoj, partoprenintaj la rezistadon aŭ partizanmiliton jam estas herooj: La horloĝisto de Djen Bjen Fu, la vundita vilaĝa instruistino Horan, same kiel la juna pentristino Nguyet kaj ne laste la partizanoj, kies atendeman paciencon kaj senbruajn sinoferojn oni prisilentas.

Vide al tiuj vjetnamaj suferoj la postulo de la homaro estu paco! Ĉiuj agu, por ke paco venku!

Hella Sauerbrey

KORESPONDDEZIROJ

Bulgario

Dez. koresp. membroj de la esperanto-societo „Balkan-stelo“, p. k. 90. **Trojan**

Dentkuracisto, 50 jara, dez. koresp. Alis Konstantinova, **Pomorie,** str. Samuil 12-a

Junulara klubo de internacia amikeco, kolektive kaj individue, dez. aranĝi reciprokajn vizitojn. Adreso Mladejki dom, Interklub, **Šumen**

Lernantino, 5-a klaso, Dimitrina Jirkova Zaŝeva, **Targovište,** kv. Iztok, bl. 13

El la urbo **Ruse** dez. korespondi:

Diana Vitska, str. Br. Obretenovi 13, pri ceramiko, arto;

Venelin Vitski, 39 j., str. Br. Obretenovi 13, pri arkeologio, fotografio, historio de la transporto;

Verka Dimova, str. P. D. Petkov, 11, pri pentroarto, bk;

Margarita Stojanova, bulv. Ang. Gecov 52-b, p. k. 17 pri kino, poezio;

Donka Geneva, bulv. Lenin 163

Dez. koresp. Bojan Conev, str. Stara planina 19, **Svištov,** dez. komunan foton kun amikoj de aliaj landoj, sendas esperantaĵojn.

Teknikisto, 35-jara, pri fotografado, kinoamatoroj, filatelo, kol. bk, Conjo Borisov, **Sevlievo,** str. Bakston 21

Lernantino en 9-a klaso, kol. pm, bk, Antoaneta Nikolaeva, vilaĝo **Opaka,** Taroovište-distrikto

Lernantino, 17 jara, pri estrada muziko, Cenka Borisova Alexandrova, ul. Topolnitsa, W. 11, **Targovitše**

ČSSR

16-jara junulo dez. koresp., kol. fromaĝglumarkojn, Jaromir Hinicica, Šimackova 27, **Ostrava 2**

GDR

Radiamatoroj-esperantistoj (HAMs, SWLs-interesatoj) kontaktu Michael Lennartz (DM-5542/D), **DDR - 172 Ludwigsfelde,** Eschenallee 45

Junpioniroj (9-jaraj), bk, tutmonde. Skribu al Margot Michel, Pestalozzi-Oberschule, Kl. 3b, **8312 Heidenau**

Junulo, 23-jara, kun ĉ.l. pri ĉ.t., speciale pri lingvoj, artoj, filatelo. Eberhard Küttner, **DDR-9262 Frankenberg,** PSF 15

Kiu povas helpi? Serĉataj estas por kompletigo jenaj numeroj: Germana Esperantisto, jarkolekto 1924, n-roj 1, 2, jarkolekto 1929, n-ro 12, Hungara Esperantisto, jarkolekto 1968, n-roj 5—12. Helpemuloj skribu al Jürgen Hamann, **DDR-705 Leipzig,** Püchauer Straße 3

Lerneja esperanto-grupo, 12 geknaboj, 13 j kaj plenkreskula grupo 8 amikoj, 18—55 j, dez. koresp. pri turismo, pacmovado k aliaj temoj, bele ilustritaj bk. resp. garant. Skribu al Esperanto-grupo „La ponto“-Ronneburg (Kurt Heeg), 9622 **Fraureuth,** str. Fritz-Heckert-Ring 70, GDR

Dez. koresp. kun juna familio pri harmonio inter la popoloj, infanedukado. Wieland Kochte, **DDR-8019 Dresden,** Wartburgstraße 15

Hungario

Serĉata la disko kun Himno de Riego. (p.e. 410022, 580001 au 560061) de Csüllög Georg, **Vestö,** Mikszath Kalman 32

Lernantino dez. korespondi. Gyula Kovacs, **6100 Kiskeenfelegyhara,** Hunyadiu 4

Inĝeniero, 50-jara, en angla, germana, Esperanto. Josef Vegh, **1065 Budapest VI,** Bojcsy Zsilinsky ut. 33, III, 6

Inĝenierino, 25-jara, en angla, germana, Esperanto. Maria Szantpeteri, **1124 Budapest XII,** Tormalja ut. 19, I

Oficistino, 19-jara, kol. bk, diskojn. Boros Katalin, **F-5123 Jaszarokszallos,** Halasa u. 21

Lernantino, 8-a klaso, dez. koresp. Daniel Helga, **H. 7300-Komlo,** Arany Janos ut. 8

Hispanio

Gejunuloj dez. korespondi. E.K.U.S. ĉe A. Grau, str. Felix Amat, **72 Sabadell** (Barcelona)

Jugoslavio

Elektrikisto, 33-jara, kun germanaj amikoj pri sporto, turismo, fotografado, popolaj kutimoj, interŝ. insignojn, amatorajn fotójn, suvenirojn. Mirko Zlatkovič, **22240 Šid,** Str. Save Sumanovica 46

Mongolio

Lernanto de 10-a klaso serĉas internacian korespondon, kol. pm, insignojn, bildkartojn, artkartojn. N. Ĝambaldorĝ, **Ulan-Bator,** 20. Schkola, klaso 10b

KORESPONDDEZIROJ

Rumanio

43-jara viro korespondemas tutmonde. Emilo Radu, Str. St. Gheorgiu 33, Tg. **Mures**

Soveta Unio

Kvardek komencantoj (15—25 jaraj) deziras korespondi pri ĉiuj temoj kun ĉiuj landoj. Respondoj certaj. Adreso: Kazaĥa SSR, **Talgar,** Dom Kulturi. Esperanto, al Grigorij Gercikov (Gvidanto)

Litovio, Panevéjis - 6, 9 vid. inokykla, internacia klubo „Amikeco“ (lernantoj 14—17 jaroj) dez. korespondi

35 jara instruistino Regina Miller dez. kor. Adreso: Litovio, **Panevižys,** Nemuno 20—31

Ni serĉas seriozan korespondanton, kun kiu ni povu vere kunlabori: aranĝi konkursojn (pri niaj landoj, E-o ktp.), interŝanĝi interesajn materialojn pri niaj landoj, urboj famaĵoj kaj tp. Nia anaro estas plejparte gelernantoj kaj gestudentoj, kvankam ankaŭ E-veteranoj estas niaj klubanoj.
Skribu al A. S. Melnikov, ab. j. 233, **Rostov-Don,** USSR

Flegistino medicina, 3 jara, dez. koresp. pri ĉiuj temoj. Zita Kvietkiena, Taikos prospektas 19A-1. **Klaipeda,** Litova SSR

Pri popolaj kuracmetodoj (fizikaj, akvo-varmo, nafto ktp.) dez. koresp. d-ro P. I Tanlov, **Soĉi,** ul. Oŝtrovskij 67-68

Studentino, 19 jara de politeknika instituto. dez. koresp. pri muziko, filmoj. pm. Danuta Balčiunaite, **233031 Kaunas,** Žurrinto g. 6-1, Litova SSR

16 jara knabino dez. koresp., interŝanĝu pm. bk, esperanto-libroj Gintarie Liatukaite, **232005 Vilnjus,** Krokivos 9-a-19, Litova SSR

Studentino de Litova lingvo dez. koresp. pri literaturo, muziko, Aranauskaite, Line, 507 ĉambro, II Koruko, stud. - 39 - Vilius - 34

Juna esperantistino, studentino de biologio, dez. koresp. kun ĉiuj landoj, ĉiuj temoj, kol. bk, esperantaĵojn insignojn. Respondo certa. Abdullina Venera, **Tjumenj-3** (625003) do vostreb. USSR

Studentino, 21 j. de fremdlingva fakultato, dez. koresp. tutmonde pri ĉiuj temoj, kol. bk, librojn, pm, insignojn. Respondo certa. Sidorina Elena, **Tjumenj,** str. Rijskaja 72—6

Mezaĝa elektristo dez. k. kun ĉ. l. pri ĉ. t. kol. bk. Respondo certa. Gavydis Jonas, Juodkiŝkio 10, **235030 Kedainiai,** Litovio

Mezaĝa inĝenierino kun ĉ. l. pri ĉ. t. kol. bk, precipe stereo-bk kaj pupojn en naciaj kostumoj. Respondo certa. Snitkiene Maria, **235030 Kedainiai,** P/K 59, Litovio

Komencantaj rondetanoj (15—25 j) deziras koresp. pri ĉ. t. kun ĉ. landoj. Respondoj certaj. Adreso: Grigorij Gercikov, **Talgar,** Dom kulturi, Esperanto, Kazaĥa SSR

Studento, 19 jara dez. koresp. pri ĉ. t. Aleksandro Baklanov, av. Osvob. Donbassa d. 2 „A“ lĝ. 67, **340048 Doneck—48**

Diversaĝaj gekursanoj (14—50 j.) dez. koresp., inter ili studentoj, inĝenieroj, kuracistoj, div. laboristoj kaj grupo da lernantoj. Ina Varkaly, Esperanto-kurso, **Kaunas 6,** Litovio

Svedio

Jan Vedevik, Poste Restante, **40101 Göteborg 1,** 55-jara sola oficisto, pri ĉiuj temoj, speciale literaturo, arto, interŝ. fotojn, bk

---

Ni funebras:

En aĝo de 71 jaroj mortis en Hartmannsdorf meritplena kaj senlaca laborista esperantisto *Richard Schönfeld.*

Internaciaj aranĝoj
(Pollando, aldono al pĝ. 26)

Internacia Somera Esperanto-Tendaro por gejunuloj ĝis 15 j. Unua parto 15.—31. julio en Gdansk. Dua parto 1.—15. aŭgusto en Smoljan. Informojn donas L. Galicka, Kol. Ochota 34, Pl-Gdansk.

Herausgeber: Kulturbund der DDR (Zentraler Arbeitskreis Esperanto).
Redaktion: 108 Berlin, Charlottenstr. 60.
Fernruf: 22 59 91.
Verantwortl. Redakteur: Detlev Blanke.
Redaktionskommission: Otto Bäßler, Dr. Hans Eichhorn, Rudi Graetz, Rudolf Hahlbohm, Willi Vildebrand. - Veröffentlicht unter der Lizenznummer 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. - Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckwerkstätte Glauchau
III-12-8 301